

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Estraranoj
ĉe UN**

Kalendaro 1996

Informa *Influo*

**Bonino:
"Tempo realfronti
la lingvan problemon"**



Enhavo

- 41 Eksteraj rilatoj: Entuziasmo en Novjorko (Mark Fettes)
- 42 Ni klare antaŭvidu la politikan vojon (intervjuo kun Emma Bonino, ano de la Eŭropa Komisiono)
- 45 Kongresa komuniko 2 de la 81-a Universala Kongreso en Prago
- 46 La membraro de UEA en 1995
- 47 Fondaĵoj: Canuto firmigas "U" en "UEA" (Osmo Buller); Oficeja ilo — unua en Nederlando
- 48 Tutmonde: Festaj eroj el decembro
- 49 Speciala sekcio: *Influo* numero 10
- 53 Kalendaro 1996
- 56 Oficiala informilo
- 57 Laste aperis
- 58 Loke – Fake
- 59 Nekrologoj
Anoncetoj
- 60 Nekrologoj: István Bácskai (1908-1996);
Albert Goodheir (1912-1995)

Vi trovos

ke ano de la Eŭropa Komisiono konsideras sin "amiko de Esperanto" kaj eĉ parolas en unua persono pri "ni, esperantistoj" (p. 42-44). Emma Bonino scias ke "internacia uzo de etna lingvo implicas signifajn problemojn de lernado... , kultura koloniado kaj politika malegaleco", kaj konscias ankaŭ pri "la nerompebla muro de antaŭjuĝoj" koncerne Esperanton. Laŭ ŝi, profesia politikisto, tiujn antaŭjuĝojn oni superu en politika lukto, kiun oni devas "klare antaŭvidi, projekti kaj organizi". Ŝi jam faris gravan paŝon per la starigo de laborgrupo "pri la kostoj de la lingva transnacia nekomunikado". Tamen, "paŝoj" favore al Esperanto ne sufiĉas, ĉar temas pri "tuta vojo, kun vera ekiro en iu tago X kaj kun same reala alveno en iu tago Y". Emma Bonino invitas al kuna iro sur tiu vojo.

Estraranoj de UEA serĉis kaj trovis vojkunulojn lingvopolitikajn ankaŭ en Novjorko ĉe UN kaj ĉe neregistaraj organizoj (p. 41).

La kovrilo: Emma Bonino. (Foto: Sekretariato de Emma Bonino.)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktofinio: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establiĝita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.
Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 35; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefaksa: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ✉+82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ☐ keast@soback.kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario (strategia planado, eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282 [of/h]; ✉+1-613-565-9279 [of/h]; ☐mfettes@magi.com.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-5284-1214 [h], +31-50-613769 [of]; ✉+31-50-613763 [of]; ☐azgiow6lfred@relay.nl.net.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-208242 [of]; ✉+370-7-204970 [of].

Estrarano (kongresoj, kulturo, TEJO): s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98 [h]; ✉+39-6-39-72-61-69 [h]; ☐mc8750@mcmlink.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ✉+972-2-658-4437 [of]; ☐amri@vms.huji.ac.il.

Entuziasmo en Novjorko

Post la oktobraj vizitoj en Parizo kaj Bruselo, LEE Chong-Yeong kaj Mark Fettes daŭrigis januare en Novjorko la diplomatian ofensivon de la UEA-Estraro.

Mi volas persvadi niajn membrojn pri la uzindeco de Esperanto. Bonvolu liveri al mi la argumentojn! Pli-malpli tiel formulis sian peton William R. Pace, la ĉefoficisto de la Mondfederista Movado en Novjorko. Li estis nur unu el pluraj homoj kiuj entuziasme bonvenigis la prezidanton kaj ĝeneralan sekretarion de UEA, la 25-an kaj 26-an de januaro 1996.

La prioritata celo de la vizito estis varbi la partoprenon de reprezentanto de Unuiĝintaj Nacioj en lingvopolitika simpozio dum la 81-a UK en Prago (vd. nov., p. 182). Per antaŭa interŝanĝo de leteroj, montriĝis ke la daŭra financa krizo de UN jam nuligis la vojaĝbuĝeton por partopreno en tiaj aranĝoj. Lee kaj Fettes tamen kunsidis kun Federico Riesco, la direktoro de la lingvaj servoj de UN, por klopodi trovi solvon. Ili kaptis la okazon ankaŭ por pli detale informi direktoron Riesco kaj tri altrangajn oficistojn el lia sektoro pri la nuna uzado de Esperanto kaj pri la laboro de Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA por dokumenti, studi kaj solvi lingvajn problemojn. (Farante plian paŝon tiudirekte, la 3-an de majo UN gastigos la 13-an Konferencon pri Lingvo kaj Komunikado, CED-aranĝon kiu tra la jaroj fariĝis la ĉefa forumo por pridiskuti la lingvan reĝimon de UN en lingvosciencia kadro.)

Ĉe UN mem, la UEA-delegacio (kiu inkluzivis Rochelle Grossman, la gvidantinon de la Novjorka Oficejo) vizitis Leona Forman, la respondeculinon pri rilatoj kun neregistaraj organizoj (NRO-j), kaj la oficejon de Unesko, kie subdirektoro Andrew Radolf proponis aktive kunlabori kun UEA sur la kampoj de lingvaj rajtoj, huma-

nisma edukado, kaj la kulturo de la paco. La UN-ambasadoro de Ĉeĥa Respubliko parolis afable kun la delegacio dum duona horo; vicambasadoro en la finna misio konsilis sincere kaj malkaŝe pri la malfacileco enkonduki reformojn en UN; kaj la ĉefo de la interpreta fako en la germana misio esprimis grandan intereson pri la klopodoj de UEA meti la lingvan



LEE Chong-Yeong (maldekstre) ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kun Federico Riesco, direktoro de la lingvaj servoj de UN

problemon sur la tagordon de la Ĝenerala Asembleo.

Krom la mondfederistoj (ĉe kiuj Esperanto estas jam oficiala sed mal multe uzata), ankaŭ pluraj aliaj neregistaraj organizoj — kiuj svarmas ĉirkaŭ la sidejo de UN kvazaŭ ĉe abelujo — akceptis la delegacion. La Monda Pacpreĝa Societo informis nin ke Esperanto estas nun inkluzivita en la dekoj da lingvoj kiujn la Societo konstante proponas por pacpreĝaj ceremonioj tra la mondo. (Esplorata estas la ebleco okazigi similan aranĝon kadre de UK.) La UN-direktoro de Bahaa Internacia Komunumo, Teches-

te Ahderom, montris al ni referaĵon per kiu lia organizo pledis por neŭtrala internacia lingvo ĉe UN antaŭ nur du monatoj; duono de la referencoj koncernis Esperanton (vd. feb., p. 36).

Ĉe tiuj organizoj, kiel ankaŭ ĉe la Monda Konferenco pri Religio kaj Paco kaj la Monda Federacio de UN-Asocioj, la delegacio diskutis eblojn de kunlaboro, i.a. okazigon de kursoj kadre de internaciaj konferencoj kaj starigon de Novjorka laborgrupo por la lingva reformo de UN.

Tiurilate povos helpi la agemo de nova alveninto en Novjorko: lastatempe la Transnacia Radikala Partio

estis akceptita en la unuan kategorion de konsultaj rilatoj ĉe la Ekonomia kaj Sociala Konsilio de UN, EKOSOK (ĉe kiu UEA tenas rilatojn en la dua kategorio). Kiel konate, TRP celas kunlaborigi parlamentantojn en ĉiuj landoj por kelkaj komunaj celoj, inkluzive de la ĝenerala instruado kaj uzado de Esperanto. La direktoro de ĝia Novjorka oficejo, Marino Busdachin, proponas prezenti tagordan punkton pri la lingva demando al la venonta kunsido de EKOSOK, nome de la tuta konferenco de NRO-j. La ĉefa malhelpo al tio estas la relativa manko de aktivuloj en Novjorko mem: pluraj semajnoj da intensa lobiado — prefere eĉ monatoj — estus necesaj por pretigi la

vojon al serioza diskuto de lingvaj problemoj kaj la ebla kontribuo de Esperanto. Nek TRP nek UEA havas tujan solvon al tiu problemo, sed la Novjorka interparolo estis utila paŝo al la serioza pretigo de tia kampanjo.

La tutan viziton tre lerte kaj diligente organizis Rochelle Grossman, kiu ankaŭ aranĝis renkontigon kun Novjorkaj esperantistoj por la lasta vespero. Cetere, el ĉiuj flugoj, restadkostoj kaj aliaj aranĝoj por la dutaga vizito, nur unu tagmanĝo ŝargis la buĝeton de UEA.

*Mark Fettes
Ĝenerala Sekretario*



Ni klare la polit

Emma Bonino respondas ankaŭ pri humanitara helpo.

Unu el viaj kolegoj en la Komisiono, Marcelino Oreja, resumis jene la sperton de publika kunsido (17-18 okt. 1995) rilate la revizion de la Mastrohita Traktato: “Montriĝis ke la civila socio havas tutan serion da demandoj pri la Unio, pri ties funkciado kaj celoj. Mi konstatas ke la eŭropanoj (...) faras al si zorgojn pri la samaj aferoj: laborpostenoj, paco, medio, reciproka respekto de rajtoj, egala traktado, forigo de la materiaj kaj sociaj baroj por la disvolviĝo de la individuo.” En tiu listo ne aperas la problemo de lingva komunikado en la Eŭropa Unio. Ĉu pri ĝi la eŭropanoj vere ne “faras al si zorgojn”?

La plejparto de la eŭropanoj bedaŭrinde ankoraŭ ne faras al si zorgojn pri la lingva problemo, ĉar ili opinias ke ĉi tiun facile povas solvi la uzo de la angla lingvo. Pri tio mi tute ne konsentas: internacia uzo de etna lingvo implicas signifajn problemojn de lernado kaj, precipe, de kultura koloniado kaj politika malegaleco.

Evidente, Esperanto tute bone povas eniri la aron de ĝeneralaj celoj kiujn kolego Marcelino Oreja alstrebas. La proponon de la esperantistoj malhelpas faktoroj kiuj rilatas ne tiom al la lingvo mem kiom al la politikaj-naciismaj intereso kaj, precipe, al la nerompebla muro de antaŭjuĝoj.

Proponi Esperanton kiel lingvon internacian — aŭ prefere

transnacian — estas malpli facila entrepreno ol oni povus imagi, sed la Radikala Partio — kies sekretario mi estis — kaj “Esperanto” Radikala Asocio (ERA) agadas sur ĉi tiu kampo. Ni provas tion kio eblas, kontraŭ tio kio probablas.

En la konferenco “Lingvopolitiko en Eŭropo” (6-8 okt. 1995, Marburg) Uwe Korch, oficisto de la Eŭropa Parlamento, diris ke diskuto je alta nivelo pri la eŭropa lingvo-problemo mankas pro tio ke “la temo estas bombo, kiun oni timas preni en la manojn.” Ĉu vi konsentas? Ĉu ne estus tempo malprajmi tiun bombon, ekdiskutante la problemon je konvene alta decidnivelo?

Dum la lingva problemo restas nesolvita, ĉiam estas tempo denove alfronti ĝin en la Eŭropa Parlamento kaj en la aliaj institucioj de la Unio.

Mi diras: denove alfronti, ĉar jam en 1994, okaze de la diskutoj pri la novaj EU-programoj Socrates kaj Leonardo, [la radikala eŭro-parlamentano] Marco Pannella prezentis amendojn, kiujn ankaŭ ekster la parlamentejo subtenis komuna manifestacio de ERA kaj de la Radikala Partio. Bedaŭrinde, la amendoj ne estis aprobitaj, sed aliflanke la sukceso de la manifestacio aranĝita ĉe Unesco en Parizo, dum la 26-a Ĝenerala Konferenco, montras ke ni havas bonajn kialojn por resti optimismaj.

Vi mem iniciatis la starigon de laborgrupo — kiu ĵus kunsidis — kun la celo produkti diskutdokumenton, Verdan Libron “pri la kostoj, por servouzado-konsumanto kaj por EU-civitano ĝenerale, de la lingva transnacia ne-komunikado” (el via letero de 25 nov. 1994 al Reinhard Selten). Kiel vi povos uzi la rezultojn de tiu laborgrupo? Ĉu tia Verda Libro povus havi iun efikon?

La ideo de Verda Libro, pri kiu kunlaboros ankaŭ via —

Ĵus aperis!

Propono por eŭropa strategio de la Esperanto-movado:

Politika hegemonio kaj lingva hegemonio en Eŭropo.

Andrea Chiti-Batelli, Pierre Janton. La unuan parton el la itala trad. Umberto Broccatelli. Rotterdam: UEA, 1995.

19p. Esperanto-Dokumento 33E. 4,80 gld.

nia — ekonomia Nobel-premiito Selten, venis de ERA, kaj mi tuj subtenis ĝin ĉar laŭ mi gravas ke oni sukcesu kompreni kiajn barojn al la ekonomia evoluo kaj kiajn instituciajn kostojn oni renkontas pro manko de federacia lingvo eŭropa. Bedaŭrinde leviĝis problemoj kiuj malhelpis pli rapide realigi tiun informan projekton, sed mi kredas ke nun ni jam proksimas al la celo.

Poste ni vidos kiel plej bone uzi la rezultojn, tamen jam nun mi diru ke dependos de tio kiom disponeblas kaj kiugrade engaĝos sin la profesoroj partoprenantaj en la projekto — unuavice Selten, kiu, estante Nobel-premiito pri ekonomio, ne povos ne ĉefroli en la utiligo de la rezultoj.

Laŭ la enkondukaj vortoj de Egon Klepsch, tiama prezidanto de la Eŭropa Parlamento, al konferenco pri “La komunika kaj lingva problemoj en la Eŭropa Komunumo” (Bruselo, 29 sept. 1993), “sine de la eŭropaj instancoj ne ĝustas paroli pri komunik-problemoj, ĉar tie ĉiuj scipovas du-tri lingvojn.” Kia estas via persona sperto pri tio? Kaj kiujn lingvojn vi mem konas aŭ bone regas?

antaŭvidu ikan vojon

Inter la 20 anoj de la Eŭropa Komisiono troviĝas amiko de Esperanto: la itala komisionano Emma Bonino perfekte konscias pri la postuloj de lingva demokratio kaj la ebloj de internacia lingvo. Fine de januaro ŝi donis skriban, itallingvan intervjuon al nia revuo.

Mi malkonsentas kun Klepsch, mi povus rakonti amuzajn anekdotojn pri la magraj lingvokonaj de iuj parlamentanoj... kaj, ĉiuokaze, la lingvoj konataj ĉiam estas la samaj. Iam la diplomacia lingvo estis la franca, nun superas ĝin la



konsumantoj, kaj pri la Oficejo por Humanitara Helpo de la Eŭropa Komunumo (ECHO).

Naskiĝis la 9-an de marto 1948 en Bra (Cuneo, Italio). Diplomiĝis en 1972 pri lingvoj kaj literaturo ĉe Universitato Bocconi en Milano.

1975 Fondis Centron de informado pri steriligo kaj abortigo (CISA) por doni medicinan helpon al virinoj.

Emma Bonino, ano de la Eŭropa Komisiono

Komisionano pri fiŝkaptado, protektado de

1976 Elektiĝis kiel itala parlamentano; reelektiĝis poste ĉiun fojon (1979, 1983, 1987, 1992, 1994). Interalie prezidis la parlamentan frakcion de la Radikala Partio kaj membris en la prezidio de la parlamento.

1978 Motoris referendumon kontraŭ atomenergio, kiu atingis nuligon de la programo de civila atomenergio en Italio.

1979 Membro de Eŭropa Parlamento; reelektita en 1984.

1981 Kunfondis la asocion Nutrado kaj Malarmado Internacia.

1987 Kuniniciatis internaciajn kampanjojn por homaj, civitanaj kaj politikaj rajtoj en Orienta Eŭropo.

1991 Aktiva probatalanto — pere de parlamentaj kampanjoj, referendumoj kaj civitana malobeo — de drogpolitiko neprohibicia kaj limiganta la damaĝajn efikojn.

1991-93 Prezidanto de la transnacia kaj transpartia Radikala Partio.

1993-94 Sekretario de la partio.

angla. Ĉiam temas pri povo, neniam pri konscia kaj egalisma elekto. Tamen, realisme, nuntempe oni ne plu povas taŭge labori je internacia nivelo sen scipovi la anglan.

Kio min koncernas, mi parolas, evidente, la italan; krome, pro mia doktoreco pri lingvoj, la hispanan, anglan kaj francan, kaj mi povas elturniĝi en kelkaj aliaj lingvoj.

Nome de la Komisiono, lastatempe (17 majo, resp. 31 majo 1995) Edith Cresson respondis negative al la demandoj de eŭro-parlamentanoj Marie-Paule Kestelijn-Sierens kaj Marianne Thyssen, ambaŭ pri eksperimentaj instruprojektoj de Esperanto. Cresson argumentis ke la tasko de la Komisiono estas “subteni la lingvojn kaj kulturojn de la membroj-ŝtatoj”, ne Esperanton, ĉar al ĝi “mankas la kultura kaj historia riĉeco de natura lingvo”. Laŭ ŝi “la Komisiono opinias ke la uzo de neŭtrala lingvo povus konduki al ia perdo de tradicio kaj identeco”.

Ĉu tiuj eldiroj ne montras ke ene de la Komisiono mankas informiteco pri kelkaj gravaj aspektoj, kiujn lingvistoj povas konfirmi, i.a. pri tio ke

– Esperanto estas lingvo kiel la aliaj;

– ke uzo de neŭtrala lingvo ne limigus la uzon de eŭropaj lingvoj, sed ĝuste protektus la lingvodiversecon, i.a. la uzon de minoritataj lingvoj;

– ke Esperanto faciligas la lernadon de aliaj lingvoj?

Mi tute konsentas kun vi, sed la demando formuliĝas jene: kiel sukcese teni la atenton de la alparolatoĉe la temo, sufiĉe longe por transdoni al ili la sciojn necesajn por racia prijuĝo superinta la antaŭjuĝeman rifuzon? Persone, mi kredas ke ĉiuokaze la ĉefa vojo irenda estas tiu de la politika lukto. Fakte, la frazo kiun vi citas de Cresson estas klare juĝo unuavice politika, pli ol kultura.

Vi konsideras vin amiko de Esperanto. Kial? De kie venis impulso por tio?

Mi konsideras min amiko de Esperanto ĉar mi estas — ne nur pro miaj ideoj — mondĉivitano, kaj mi kredas ke mia tuta vivo pravas tion.

Kial la Radikala Partio estas la sola grava politika forto kiu plenforte subtenas Esperanton?

La Radikala Partio estas la sola grava politika forto plenforte subtenanta Esperanton ĉar ĝi estas la unua transnacia kaj transpartia partio en la mondo. Transnacieco kaj transpartieco signifas politiki trans la limoj etnaj, teritoriaj, lingvaj, ideologiaj, trans la limoj de la teritoria aparteno de naciaj partioj; ĝi signifas prioritatiĝi etikon al etno, tio estas ke morto pro malsato aŭ pro

mortverdikto ne malpli gravas se ĝi okazas alilande, ke ĝi ĉiukaze restas tre zorgiga fakto.

Ne estas tiel ke malrespekto de homrajto des malpli gravas ju pli malproksime de nia devenlando ĝi okazas.

Ankaŭ en la interna organizo de nia partio ni spertis kiom pezas, energie kaj finance, la malfacilo komuniki tutplanede. Rilate la aparataron, ni provizis nin per efika telematika sistemo, Agorà, sed la lingva problemo restas. Agorà estas multlingva sistemo, t.e. oni povas doni ordojn aŭ uzi eblajn tekstovariantojn en 7 lingvoj, inter kiujn ni elektis enmeti ankaŭ Esperanton.

Tamen, kiel mi diris, la lingva problemo restas: en la telematiko la angla jam regas, dum la aliaj lingvoj marĝeniĝas — ĉi-rilate povus helpi la esperantistoj kaj iliaj organizoj ĉeestantaj en Interreto.

Je eŭropa nivelo, kiajn praktikajn paŝojn oni povus entrepreni pri Esperanto kun espero de sukceso?

Trans la pure principaj deklaroj de la rezolucioj en 1954 kaj 1985, la esperantista projekto Fundapax, aprobita de Unesko en Parizo, estis bona, unua, praktika sukceso politika. Nun necesas daŭrigi sur tiu vojo, same kun la internaciaj organizoj kiel kun la eŭropaj institucioj.

Ne tiom temas pri “paŝoj” favore al Esperanto, kiom pri tuta vojo, kun vera ekiro en iu tago X kaj kun same reala alveno en iu tago Y. Tiun vojon ni, esperantistoj, devas klare antaŭvidi, projekti kaj politike organizi. Mi scias ke la Radikala Partio kaj ERA laboras pri tio.

Antaŭ nelonge vi renkontis LEE Chong-Yeong, la prezidanton de UEA, plurajn ties estraranojn, kaj — reprezente de la laborgrupo pri la lingvoproblemo en EU — Hans Erasmus. Ĉu vi antaŭvidas pluan konkretan kunlaboron kun UEA?

Mi kredas ke la demando de kunlaboro kun UEA estas tute en la manoj de UEA mem.

Prefere mi klarigu per ekzemplo: kun kelkaj aliaj mi kundecidis ke ni invitu kaj gastigu praktike la tutan tiaman estraron de UEA, kiel referantojn al la kongreso de la Radikala Partio en 1992. Je tiu okazo la demando “Internacia Lingvo” staris en la centro de la kongresaj prezentoj kaj diskutoj, kaj viaj reprezentantoj raportis pri Esperanto al publiko de pli ol cent parlamentanoj el 42 landoj, apartenantaj al pli ol 90 partioj. Vi scias ankaŭ ke tiam, kun grandega financa fortostreĉo, ni dissendis al ĉiuj parlamentoj de la mondo gazeton en multaj lingvoj, i.a. en Esperanto, kiu parolis en ĉiu numero ankaŭ pri la Internacia Lingvo.

Tiu estintus brila okazo por konstrui ponton inter esperantistoj kaj parlamentanoj de tiuj landoj, kaj tiam hodiaŭ ni status grandan paŝon pli antaŭe. UEA tamen ne decidis daŭrigi sur tiu vojo.

Mi esperas ke kun via nova prezidanto io ŝanĝiĝos kaj ke ni povos, fine kaj komune, labori por projekto de

la internacia lingva demokratio kaj de Esperanto. Same nun kiel antaŭe, mi estas por tio. ★

Unu el la plej interesaj! Abonu NUN al

EVENTOJ

*Petu senpagan provnumeron:
pk 87, HU-1675 Budapest, Hungario.*

La Eŭropa Komisiono

Apud la Eŭropa Parlamento (EP) kaj la Konsilio de ministroj, la Eŭropa Komisiono estas la plej grava reg-instanco de la Eŭropa Unio (EU). Kun iniciataj, ekzekutivaj kaj kontrolaj rajtoj kaj devoj, la Komisiono “estas kvazaŭ registaro kun limigita povo” (*Deklingva manlibro pri politiko*).

La Komisiono havas 20 membrojn: po du el la plej grandaj Britio, Francio, Germanio, Hispanio kaj Italio,



Prezidanto Jacques Santer sidas sub la EU-flago, iom maldekstre de ĝi. Emma Bonino estas la kvara je lia maldekstro.

plus po unu el la aliaj 10 landoj. La prezidanto de la Komisiono estas proponata de la registaroj de ĉiuj membroŝtatoj kune, dum ĉiun alian anon rekomendas ties propra registaro — sed la Eŭropa Parlamento devas esti konsultita antaŭ la propono pri la prezidanto, kaj poste ĝi devas voĉdone akcepti la konsiston de la Komisiono kiel tuto. Unu oficperiodo daŭras kvin jarojn (la nuna: 1995-2000), egale al tiu de la EP-anoj.

La komisionanoj agas maldepende de la naciaj registaroj, en la intereso de la tuta EU. Ĉiu el ili havas aparta(j)n labortereno(j)n kaj respondecas pri la koncernaj administraj fakoj. La Komisionon nur la EP povas demisiigi, akceptante rezolucion pri malaprobo. (Tio ĝis nun neniam okazis.)

Kiel gardanto de la eŭropaj traktatoj, la Komisiono atentis pri la apliko de tiuj kaj de la decidoj faritaj sur ties bazo. Kiel gvidanta instanco, ĝi sola havas la rajton iniciati EU-nivelajn leĝojn, aprobotajn de la EP kaj la Konsilio. Fine, kiel plenuma organo, ĝi aplikas la regulojn de la eŭropaj traktatoj al konkretaj kazoj, kaj mastrumas la buĝeterojn destinitajn al diversaj EU-celoj.

La Komisiono disponas 16 000-kapan oficistaron en 24 t.n. ĝeneralaj direktoj, en Bruselo kaj Luksemburgo. El tiuj oficistoj 2483 laboras aŭ en la Tradukservo aŭ en la Komuna Servo por Interpretado kaj Konferencoj; ĉ. 1800 el ili estas tradukistoj kaj interpretistoj. La komisionano respondecas pri la lingvaj servoj — same kiel pri ĉiuj personaraj kaj administraj aferoj — estas la finno Erkki Liikanen. La administraj elspezoj de la Komisiono kaj la rilataj instancoj konsistigas 5% de la tuta EU-buĝeto.

81-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Prago (Ĉeĥa Respubliko) 20-27 julio 1996



Konstanta adreso

81-a UK de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de LKK

81-a UK de Esperanto, P.K. 1069, CZ-111 21 Praha 1, Ĉeĥa Respubliko.

Dua Bulteno

Komence de februaro aperis kaj dissendiĝis al ĉiuj kongresanoj la oficiala Dua Bulteno, kun kongresa mendilo. La plaĉa, 32-paĝa broŝuro priskribas 15 hotelojn kaj la ekskursojn, donante krome amason da utilaj informoj pri la kongreso mem.

Loĝado

Hotelo Forum situas apud la kongresejo (po 120 gld. en dulita ĉambro, po 180 en unulita). Ankaŭ Hotelo Panorama estas tre proksima (86 gld., resp. 145 gld.). En aliaj hoteloj — ĉiuj ne tro foraj kaj bone atingeblaj per publika transporto — la prezoj varias de 50 ĝis 83 gld. por loko en dulita ĉambro. Studenta loĝejo havas ĉefe tri- kaj kvarlitajn ĉambrojn, kiuj kostas 35 gld. tage (dulita: ĉ. 40 gld.). Amasloĝejo estos organizita nur por la junularo.

Ekskursoj

Sep tuttagaj ekskursoj proponas viziton al diversaj regionoj de la interseĝa Bohemio, sed ankaŭ detalan esploron de Prago mem. La duontagaj ekskursoj parte celas la urbon kun ties multnombraj vidindaĵoj, parte invitas eksterurban al admirindaj kasteloj aŭ al vilaĝ-muzeo. La plej allogaj estos verŝajne la vesperaj ekskursoj: teatrovizito, koncertoj, biervespero en la fama bierejo U Flekŭ, muzika vesper-

manĝa krozo laŭ la rivero Vultavo, aŭ kamparana fest(en)o kun polko kaj aliaj dancoj.

Antaŭkongreso

La temo “La moravia folkloro al la mondo” promesas riĉan kaj plaĉan programon, kun multe da muziko, arto kaj impresoj pri la moravia kulturo. Tiu ĉi ekskurso estas tamen ekstreme alloga ankaŭ por naturamantoj kaj ŝatantoj de historio.

Postkongreso

Kvar postkongresaj ekskursoj kondukas al la mondfamaj banurboj de Okcidenta Ĉeĥio; al tri urboj protektataj de Unesko pro ilia kultura unikeco; al la Komenia lando Suda Moravio; kaj, tra la magia triangulo trilanda, al Prago, Krakovo kaj Dresdeno.

Programo

Ĉi-jare aparte abundos sciencaj temoj. Senpere antaŭos la kongreson “Seminario pri lingvopolitiko de UEA” (kunordigas Detlev Blanke; adreson vd. p. 57), kaj dum la unuaj tagoj oni aranĝos Simpozion pri Lingvo en Internaciaj Organizaĵoj, dediĉitan al la japana diplomato Nitobe, granda subtenanto de Esperanto en la Ligo de Nacioj. La Esperantologia Konferenco (vd. p. 57) okazos verŝajne jam en mardo.

Paralele kun la UK kunsidos la Senato de Akademio Internacia de la Sciencoj, kaj ankaŭ ĉi-jare la Internacia Kongresa Universitato (IKU) kunlaboros kun AIS pri sciencaj kursoj, i.a. kurso de la Nobel-premiito prof. Reinhard Selten pri la lingvistikaj implicoj de la matematika ludteorio. Lia kurso komencos la prelegserion de IKU (22-a de julio, posttagmeze) kaj daŭros dum la eks-

kursa tago en Hotelo Forum, tuj apude de la kongresejo.

Paralele kun la UK okazos ankaŭ la 16-a Scienca Universitata Studadesio (SUS) de AIS, kiu daŭros ĝis la 31-a de julio. Ĝi estos solene inaŭgurita okaze de la kurso de prof. Selten. Plenrajtaj profesoroj kaj docentoj prezentos okhorajn kursojn en la sekcioj: kibernetika, humanistika, naturscienca, strukturscienca, filozofia kaj morfosciencia; parte en la kongresejo kaj parte en la Karla Universitato de Prago.

Arta Programo

La teatra programo estos riĉa, inda je la centjariĝo de la Esperanto-teatro en 1996. En lando fama pro sia muziko kompreneble elstaros ankaŭ la muzika programo, kun precipe grava kontribuo de lokaj artistoj esperantistaj.

Glumarko, afiŝo

Bela verdkolora glumarko kun arkitekturaj motivoj de Prago (3,00 gld.) estas mendebla de la Libroservo de UEA, kiu havas stokon ankaŭ de granda UK-afiŝo (3,00 gld.).

Aliĝoj

Ĝis la komenco de februaro aliĝis ĉ. 2000 personoj el 53 landoj. Plej amase anoncis sin ĉeĥoj, germanoj, francoj, poloj, japanoj, italoj, nederlandanoj, belgoj, finnoj kaj rusoj.

Kotizoj

Ĝis la fino de marto (parenteze tarifo por landoj B): individua membro de UEA (IM) 279 gld. (202); ne-IM 338 gld. (252). Kunuloj, handikapuloj, junuloj (ĝis inkl. 29-jaraj) kaj komitatanoj rajtas je 50%-a rabato en sia kategorio. ★

La membraro de UEA en 1995

Lando	AM	IM	Sume	Lando	AM	IM	Sume	LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBRO-STATISTIKO		
Albanio	-	28	28	Kroatio	150	86	236	Kategorio	1994	1995
Alĝerio	-	2	2	Kubo	100	48	148	Membro-Gvidlibro	451	441
Angolo	-	3	3	Kuvajto	-	1	1	Membro-Jarlibro	1366	1528
Argentino	119	52	171	Latvio	80	33	113	Membro-Abonanto	3562	3575
Armenio	-	7	7	Libio	-	1	1	Juna Membro-Jarlibro	357	410
Aŭstralio	152	80	232	Litovio	78	43	121	Juna Membro-Abonanto	327	310
Aŭstrio	41	58	99	Luksemburgio	93	13	106	Dumviva Membro	892	877
Bangladeŝo	-	1	1	Madagaskaro	-	4	4	Juna Dumviva Membro	18	19
Barejno	-	1	1	Makedonio	-	20	20	Honora Membro	54	57
Belgio	574	197	771	Malajzio	-	1	1	Honora Patrono	9	11
Belizo	-	1	1	Malto	38	3	41	Individuaj Membroj	7036	7226
Benino	-	8	8	Maroko	-	2	2	Aligitaj membroj	11504	11246
Bjlorusio	-	14	14	Meksiko	38	12	50	Junaj aligitaj membroj	2991	2562
Bolivio	-	8	8	Moldavio	-	2	2	Membroj entute	21531	21034
Bosnio-Hercegovino	-	24	24	Mongolio	-	7	7	Societo Zamenhof	156	270
Brazilo	211	497	708	Nederlando	345	389	734	Abonoj Esperanto	197	188
Britio	701	266	967	Nepalo	-	21	21	Kolektivaj ab. Esperanto	89	82
Bulgario	1015	48	1063	Niĝerio	-	14	14	Abonoj Kontakto	462	445
Burundio	-	5	5	Nikaragvo	-	3	3	Kolektivaj ab. Kontakto	601	542
Ĉeĥio	194	80	274	Norvegio	301	79	380	Patronoj de TEJO	91	92
Ĉilio	25	7	32	Nov-Zelando	44	40	84	Kotizoj entute	23127	22653
Ĉinio	978	194	1172	Pakistano	40	18	58	En 1995 la individua membraro de		
Danio	162	100	262	Papua Novgvineo	-	2	2	UEA denove kreskis (+190) post kon-		
Ebura Bordo	25	7	32	Peruo	25	4	29	stanta falo de post 1991. Aparte elstaras		
Egiptio	-	1	1	Pollando	200	225	425	Brazilo, kun 152 novaj membroj, rezulto		
Ekvadoro	-	1	1	Portoriko	-	1	1	de efika varbado kaj pliboniĝo de la		
Estonio	62	50	112	Portugalio	159	26	185	ekonomia situacio de tiu lando.		
Etiopio	-	1	1	Ruando	-	1	1	Ĉefe la UK en Tampereo influis la		
Filipinoj	-	1	1	Rumanio	50	54	104	membronombron de Finnlando (+76),		
Finnlando	336	324	660	Rusio	83	112	195	Pollando (+133), Litovio (+30) kaj		
Francio	446	678	1124	San-Marino	-	1	1	Estonio (+19), dum Koreio kaj Japanio,		
Ganao	-	6	6	Senegalio	-	4	4	kiuj en 1994 liveris grandan nombron		
Germanio	1116	609	1725	Singapuro	-	1	1	da kongresanoj, devis registri perdon en		
Greklando	240	17	257	Sirio	-	1	1	1995(resp. -88 kaj -32).		
Gvatemalo	-	6	6	Slovakio	-	38	38	Malfondiĝis pasintjare Slovaka Espe-		
Haitio	-	1	1	Slovenio	100	29	129	ranto-Asocio, kiu en 1994 kontribuis per		
Hinda Unio	-	26	26	Srilanko	-	6	6	1020 individuoj al la statistiko de aligitaj		
Hispanio	360	198	558	Sud-Afriko	45	10	55	membroj. La perdo en la kategorio AM		
Honkongo	-	5	5	Svedio	761	275	1036	restis tamen limigita al 687, pro la suma		
Hungario	471	126	597	Svislando	119	137	256	kresko en la ceteraj landoj kaj pro aliĝo		
Indonezio	-	5	5	Tagikio	-	3	3	de du novaj landaj asocioj, Rumanio kaj		
Irano	23	52	75	Tajlando	-	4	4	Togolando.		
Irlando	50	15	65	Tanzanio	-	6	6	Societo Zamenhof atingis rekordan		
Islando	43	33	76	Togolando	25	47	72	nombron de 270 anoj, 73% pli ol en		
Israelo	179	70	249	Tunizio	-	2	2	1994. Aparta, celita varbokampanjo de		
Italio	1028	253	1281	Turkio	-	5	5	la Centra Oficejo rezultigis tion kaj mon-		
Japanio	1092	406	1498	Ukrainio	106	39	145	tris la vojon por similaj agadoj estonte.		
Jugoslavio	100	102	202	Urugvajo	25	9	34			
Kamboĝo	-	11	11	Usono	667	418	1085			
Kamerunio	-	8	8	Uzbekio	-	5	5			
Kanado	115	79	194	Vanuatu	-	1	1			
Kartvelio	-	2	2	Venezuelo	-	19	19			
Kazaĥio	-	4	4	Vjetnamio	-	27	27			
Kenjo	-	2	2	Zairio	57	12	69			
Kolombio	110	12	122	Zimbabvo	-	1	1			
Korea Resp.	111	63	174							
Kostariko	-	6	6	112 landoj	13808	7226	21034			<i>pz</i>


Canuto firmigas "U" en "UEA"

Fondaĵo Canuto estas certe la plej konata fondaĵo de UEA. Kiel "membrigilo", en la pasinta jaro ĝi helpis al 964 esperantistoj resti en la movada ĉeĥfluo.

Fondaĵo Canuto portas la nomon de Giorgio Canuto (1897-1960), kiu forpasis meze de sia mandato kiel prezidanto de UEA. La starigon de la fondaĵo anoncis tiu ĉi revuo en decembro 1960:

nederlandaj, ĉiujare ĉ. 400 nepagipovuloj membriĝas en UEA dank' al la profito de UK.

De pli ol 20 jaroj ankaŭ Instituto Hodler asignas monon al Fondaĵo Canuto. Vera ekspansio okazis kiam



“Por esprimi plian omaĝon al la memoro de la forpasinta Prezidanto de UEA, Prof. D-ro Giorgio Canuto, la Estraro decidis krei specialan fondaĵon sub la nomo Memoriga Fondaĵo Prof. D-ro Giorgio Canuto kun la celo membriĝi al UEA kiel M.J. aŭ M.A. esperantistojn el tiuj landoj, el kiuj oni ne povas pagi la kotizon.”


La ĝenerala sekretario, Ivo Lapenna, mem kontribuis tuj per 5 MA-kotizoj. “Li indikis 2 nomojn kaj petis la C.O. elekti laŭ sia bontrovo 3 pliajn.”

Ju pli UEA fortiĝis finance, des pli Fondaĵo Canuto povis ricevi ankaŭ aliajn rimedojn krom rektaj donacoj de membroj. Baldaŭ post ĝia starigo la Estraro decidis ĉiujare subvencii ĝin per 70 MA-kotizoj el la Propaganda Konto de UEA. La nombro de “kanutigitoj” estis longe ĉ. 200, sed en la 80-aj jaroj okazis grava kresko. Antaŭe la Fondaĵo pagis por ĉiu membriĝito nederlandan kotizon. Tiun regulon oni ŝanĝis, ekaplikante la tarifon de la koncerna loĝlando. Sekve la nombro de membriĝoj preskaŭ duobligis, kio signifis ke la kreskintajn kostojn UEA kovris el sia buĝeto.

Fine de la 80-aj jaroj oni plialtigis la subvencion al 150 nederlandaj MA-kotizoj, kaj en 1995 al 200. La rimedoj de la Propaganda Konto venas el la profito de Universalaj Kongresoj. Ĉar la kotizoj kiujn la Fondaĵo pagas estas duono de la


la Fondaĵoj Azio kaj Afriko ekpagis kotizojn de esperantistoj el siaj mondo-partoj. Tio okazis kiam multaj membroj en eks-socialismaj landoj ne plu povis mem kotizi. Sekve la Fondaĵo povis liberigi rimedojn por daŭrigi la membrecon por parto el ili. Tio iom

bremsis la falon de la membraro post 1991. Aparte laŭdinda estas la Azia Projekto de japanaj movadanoj por membriĝi azianojn. Ekz. en 1995 ili kolektis 4671,18 gld., kio kovris centon da kotizoj.



En 1995 Fondaĵo Canuto ebligis membrecon en UEA al 964 esperantistoj, t.e. 13% de ĉiuj individuaj membroj. Jen respektinda atingo. Tamen la Fondaĵo ne povas membriĝi ĉiujn kiuj tion petas kaj meritas. Membreco en UEA estas privilegio kiun multaj sopiras. Fondaĵo Canuto invitas ankaŭ vin kontribui kaj tiel doni pli da signifo al la litero U de UEA. Vi povas sendi vian kontribuadon al UEA rekte aŭ pere de la kotizperanto de via lando.

Osmo Buller



Oficeja ilo – unua en Nederlando

Parte per helpo de la Fondaĵo Oficeja Ilaro, ĵus aperis en la grafika fako de la Centra Oficejo nova komputilo, la unua de sia speco en Nederlando kaj unu el la unuaj en tuta Eŭropo. Havigo de unu el la meznivelaj modeloj de la firmao Apple estis jam planita, sed ĝuste je la punkto de ties aĉeto CO-oficisto Roy McCoy (en foto) legis anoncon en komputila reto pri nova Apple-kongrua “klono” (PowerWave 604/150), kiu same kostis kiel la meza modelo de Apple, sed pli rapidis ol eĉ ties plej potenca. Tuja korespondado per la reto rezultigis akiron de ekzemplero de la nova modelo, la unua kiun la usona firmao ekspedis al sia nederlanda distribuanto.

Festaj eroj el decembro

Ni forte supozas ke la ĉ. 50 decembraĵoj aranĝoj en 15 landoj pri kiuj ni sciigis, estas nur la pinto de la Zamenhof-taga glaci-monto. (Ĉiuj datoj ĉi-sube estas decembraĵoj.)

Aŭstrio

En Vieno festparolis Hans-Michael Maitzen kaj Eriko Sunardo, indonezia e-isto, kiun Radio Aŭstria intervjuis okaze de lia 50-jara e-isteco en 1996.

Belgio

N. Bracke pupteatris, Nikolin' kantis, Julia Castiau teatris *Medea* por Brusela publiko. (*Heroldo*)

Brazilo

E-istoj kunvenis en la Deputita Ĉambro de la Federacia Distrikto Braziljo. Dum ili aŭskultis prelegojn de Francisco Mattos de Oliveira kaj Ursula Grattapaglia, apude bruis debato de plenkunvenaj parlamentanoj, pri impost-altigoj. Deputito eĉ proponis ke la oratoroj lernu Esperanton, por pace interkompreniĝi! (G. Grattapaglia)

Ĉinio

Zamenhof-solenoj okazis en Pekino, Ŝanhajo, Nankino kaj aliaj 14 urboj. En Fuzhou 300 homoj festis la 10-jariĝon de la renoma E-lernejo tie. La televido de provinco Zeĵiang portretis Zamenhof en historia programo.

Francio

Malgraŭ transporta striko, 66 e-istoj renkontiĝis la 17-an en Pariza restoracio, laŭ invito de la Pariza SAT-

grupo. René Centassi, kunaŭtoro de la 5000-ekzemplera Zamenhof-biografio *L'homme qui a défié Babel*, rakontis pri la estiĝo de la libro. (*SAT-Amikaro*)

Al kunvenintoj en Wintzenheim, Bernard Reiffsteck rakontis pri vojaĝo en Vjetnamio, Nevenka Imbert pri la postmilita vivo en Kroatio. (*Franca Esperantisto*)

Germanio

En Berlino, la 9-an, ĉefe muzikan programon prizorgis la litova ensemble Asorti, ĥoro de la E-grupo Lietzen-see, kaj profesia kantisto M. Nedelesko. (*Berlina Informilo*).

Hispanio

Meso en Esperanto, paroladoj en kulturdomo, kaj fine "frata bankedo" markis la Zamenhof-tagon en Avilés. (*Antaŭen*)

Valencianoj laŭrokronis la memorplaton en Zamenhof-strato; sekvis parolado kaj bankedo. (*Valencia Suno*)

Hungario

La 16-an en Budapeŝto ĉ. 130 personoj ĝuis teatraĵeton de Majk Sadler, ĝojis pro la preskaŭ preta hungara-Esperanta mezvortaro (ĝi fine aperis en januaro), kaj konferencis pri demandoj de la hungaria E-movado.

Italio

El tritaga programo en Triesto elstaris E-lingva meso ĉe la germana katolika komunumo kaj la ĉeesto de la fama slovena aŭtoro Boris Pahor, kiu parolis pri sia verkaro (en E-o: *Pilgrimanto inter ombroj*). (*La Eta Gazeto*)

Japanio

Revigliĝon en la insulo Sikoku indikas la Zamenhof-festoj en Matuyama kaj en Kagawa, kie angle kaj japane prelegis neesperantista hungara lingvisto, prof. László Cseresnyési, pri artefaritaj lingvoj. (*La Revuo Orienta*)

Kroatio

En Zagreba festo, la 16-an, gejunuloj de Kroata E-Unuiĝo prezentis muzikajn kaj dramajn erojn. En biblioteko de Osijek, kiu aranĝis imponan E-ekspozicion, prelegis Marija Belošević. Instigite kaj helpe de KEU, bibliotekoj ekspoziciis pri E-o ankaŭ en Gospić kaj deko da aliaj urboj. (M. Belošević)

La libron *La rondo familia* de Nikola Rašić, pri sociologiaj esploroj en Esperantio, prezentis la 20-an, en lokalo de la Zagreba juda komunumo, la aŭtoro kaj la kroata akademiano Dalibor Brozović, prezidanto de Kroata E-Ligo. Poste kantis la makedona virina okteto Ezerke kaj estis lanĉita Esperanta frambo-vino. (N. Rašić)

Makedonio

En kunveno de la du societoj (fervojista kaj junulara) de la ĉefurbo Skopje junaj e-istoj prezentis verkojn de Tibor Sekelj. (S. Kocevski)

Rusio

20 jekaterinburganoj kaj iliaj gastoj aŭskultis V. Kudrjavcev kaj Aleksandr Korĵenkov pri la personeco de Zamenhof; Nikolaj Lozgaĉev solkoncertis.

En Soĉi Galina Belenjuk aranĝis festenon en saŭno. Ŝvitinte, la klubanoj tostis ĉe belega tablo je la prospero de Esperanto. (*Ruslanda E-isto*)

Ukrainio

Interurba E-renkontiĝo en Doneck (16.) temis pri la vivo kaj poemoj de Zamenhof. La 6-a Kongreso de Ukraina E-Asocio (Kievo, 16-17, 30 partoprenantoj) reelektis la estraron: prezidanto restis Viktor Pajuk. (*Heli-anto*) ★



Malto

La 16-an, membroj de Malta E-Societo kolektiĝis ĉe la Zamenhof-monumento en Msida, sur kies piedestalon MES-prezidanto Carmel Mallia metis bukedon. (S. Mugliett)

Influo

Por plibonigi la fluon de informoj pri informado



Numero 10



Bonvenon al Influo, kiu aperos ekde nun kiel ampleksa rubriko de Esperanto.

(Redaktotino por la sekva numero: la 30-a de aprilo.)

Indas atentigi pri ĝiaj celoj, kiuj estas esence tri:

(1) bildigi la agadon tutmondan de samideanoj,

(2) tiel doni informojn al alilokaj esperantistoj por

ke ili utiligu tiujn novaĵerojn kaj (3) montri kiel oni faris

iun aŭ alian agadon, kiajn antaŭjuĝojn oni renkontis,

kaj kiel oni ilin superis.

Ne necesas aludi la fakton

ke tro ofte mankas inter-

komunikado inter espe-

rantistoj, eĉ aktivuloj. Ni

esperas ke pere de Influo

oni povos almenaŭ iom

plibonigi tiun situacion.

Ni do informos pri agadoj

pasintaj kaj planataj. Bv.

nepre sciigi nin pri tiaĵoj,

sendante informojn al la

Centra Oficejo kaj, se eble,

kopion al mi, la redaktoro.

Mi antaŭdankas pro via

kunlaboro — kaj kaptas

la okazon danki same al

Mark Fettes pro lia laboro

farita por Influo.

Geoffrey Greatrex


Invito al ĉiu leganto

Por tiuj (verŝajne multaj) legantoj kiuj ne konas la historion de ĉi tiu “nova” rubriko, ni komencas per mallonga retrorigardo.

En 1989 UEA unuafoje ekhavis apartan estraranon pri informado. Tradicie, informado troviĝis sub la respondeco de Centro por Esploro kaj Dokumentado, kaj grandparte koncernis la produktadon de informiloj — ekzemple, la anglalingvaj kaj franclingvaj serioj de *Esperanto-dokumentoj* kaj la baza fakfolio *An Update on Esperanto* (“Ĝisdate pri Esperanto”). La nova estrarano pri informado, Ivo Durwael, tamen konceptis pli vastan rolon por UEA: ke ĝi peru informojn, ideojn kaj materialojn inter centoj da aktivuloj tra la mondo, iom post iom kultivante la scion kaj volon necesajn por efika kunlaboro.

Por tiu celo kreiĝis *Influo*, aparta bulteno sendata al 100 ĝis 200 inform-aktivuloj en pli ol 50 landoj. Ĝis 1992 aperis ok numeroj, redaktitaj de Durwael kaj mi mem, kiel tiama oficisto en la Centra Oficejo. Kiam mi transprenis la postenon de la respondeca estrarano en 1992, al informado aliĝis la fako de eksteraj rilatoj; kaj ŝajnis natura evoluo ke ankaŭ *Influo* larĝigu sian terenon por kovri la agadon de UEA ĉe UN, Unesko kaj similaj organizoj.

Tamen montriĝis malfacile trovi la homajn kaj financajn rimedojn por daŭrigi la eldonadon de *Influo*. Post la apero de naŭa numero en 1993, la bulteno provizore ĉesis aperi. Ĝia nun relanĉita formo, kiel foja rubriko en *Esperanto*, celas eviti la pasintajn problemojn kaj samtempe atingi multoble pli grandan legantaron. Kunigante informojn de pluraj specoj — strategiajn planojn, raportojn pri agado, praktikajn konsilojn, faktojn pri niaj diversaj celpublikoj — ĝi donos al informado kaj eksteraj rilatoj pli okulfrapan lokon inter la diskuttemoj de nia komunumo. ☺



publika agado

Finnlando

Pluraj miloj da vizitantoj al ekspozicio de la finnlanda UN-asocio spektis komputilan prezenton de Esperanto ĉe impona budo de E-Asocio de Finnlando. Inter ili estis parlamentaj grupoj kaj lerneĵanoj. (*Esperantolehti*)

Francio

Anoj de la Radikala Partio, kun reprezentantoj de la Provenca Federacio de Unuiĝo Franca por E-o, manifestaciis dum la junia kunveno de la EU-ŝtatestroj en Kanno (Cannes). Oni strebis atentigi pri la lingvo, ĉefe per disdono de la teksto de la rezolucio aprobita dum la 2-a Eŭropa E-Unia Kongreso en Parizo.

Redaktoro: Geoffrey Greatrex, 469 Wilbrod St. Apt. A, Ottawa, Kanado K1N 6N1; ☐ greatrex@aix1.uottawa.ca (adreso valida nur ĝis junio 1996). **Informa Fakto de UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎ +31 10 436 1044; 📠 +31 10 436 1751; ☐ uea@inter.nl.net

Verduloj

Asocio de Verduloj Esperantistaj (Manfred Westermayer, Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelfingen, Germanio) sendis leteron al la verdulaj membroj de Eŭropa Parlamento pri la "granda manko en la nuna lingva traktado, ekzemple en la sistemo de EU kaj en aliaj internaciaj organizoj" kaj pri la preteco de AVE instrui E-on al la adresatoj.

Hungario


Eŭropa Unio kaj la lingva demando — Perioda eldonaĵo de Hungara E-Asocio, 1. kajero, nov. 1995. La 8-paĝa, A4-formata broŝuro, redaktita de Oszkár Princz kaj László Gados, celas, laŭ la antaŭparolo, "turni la atenton al demando kiu fariĝas pli kaj pli aktuala por ni, hungaroj", pro la atendata aliĝo al Eŭropa Unio. La materialoj publikigitaj fontas preskaŭ ekskluzive el *Esperanto*, ekzemple la intervjuo kun Daniel Tarschys.

László Gados pledis, la 13-an de junio, en la opini-paĝo de la plej legata hungara taggazeto, *Népszabadság*, por la uzo de Esperanto en Eŭropa Unio. Lia longa letero "A fordítás sok pénzbe kerül: Hány nyelven beszéljenek az Európai Unióban?" ("Tradukado kostas multe da mono: En kiom da lingvoj oni parolu en EU?") estas reago al samgazeta artikolo pri "Drama situacio de la eŭropa integrado", kaj ĝi uzas multajn informojn ĉerpitajn el *Esperanto*.

➤ En la nuna estraro de UEA preskaŭ ĉiu ano respondecas pri iu aspekto de informado kaj eksteraj rilatoj. Ankaŭ TEJO agas ĉi-terene, en la lastaj jaroj pli kaj pli ofte kaj efike. Tial ne eblas resumi en unu artikolo la tutan amplekson de tiuj kampoj: pri ili vi legos popece, en ĉi tiu kaj la sekvaj numeroj. Sed mi ja volas direkti vian atenton al tri konstatoj kiuj ŝajnas al mi aparte gravaj.

La nivelo de la ekstera informa laboro pri Esperanto estas tre malproksima de la efektiva merkato por ĝi. Unue, ni bezonas pli da homoj kiuj serioze akceptas tion kiel sian taskon. Due, ni bezonas altigi la kvaliton de tia agado. Mi parolas ne pri multekostaj reklamkampanjoj, sed pri tute bazaj teĥnikoj rilate al la enhavo, prezento kaj diskonigo de informoj. Informado estas fako kiun oni devas lerni, kaj pri kiu iuj homoj estas pli talentaj ol aliaj. Niaj plej sukcesaj informistoj — kiel niaj instruistoj — meritas rekonon, subtenon kaj trejnadon.

Simila rimarko validas pri niaj eksteraj rilatoj. Unue ni bezonas homojn: ekzemple, nuntempe en Novjorko kaj Parizo preskaŭ la tuta reprezenta agado de UEA dependas de po unu persono — talenta, dediĉita, sed kun limigitaj tempo kaj fortoj. Due, en tiu agado ni bezonas kompreni pli bone niajn eblojn kaj malfortojn. Ekzemple, kiel neregistara organizaĵo ni povas profiti de multaj kunvenoj, subvencioj, informkanaloj k.s. por varbi subtenon al niaj agadoj kaj respekton al Esperanto. Aliflanke, solaj ni estas preskaŭ senpovaj kiam temas pri la politikaj decidorganoj de UN, Unesko k.a. Kvankam ni ŝatas paroli pri niaj du rezolucioj kvazaŭ pri granda venko, ili verdire estas nur simbolaj gestoj sen iu ajn sekvo por la ĉiutaga praktiko de Unesko aŭ ĝiaj membroŝtatoj.



LA PLEJ KONATA LIBRO PRI EFIKA TEMPOUZO, NUN EN ESPERANTO!



Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado

Rotterdamo: UEA 1995. Serio *Konsilaroj por Aktivuloj* n-ro 2. 53 p. 7,50 gld. Ankaŭ haveblas n-ro 1: *Kiel diskonigi vian agadon?* 3,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Kiel argumenti? Per faktoj. Kie trovi ilin? Ĉe CED!

En Esperanto, nemalhaveblaj konsultiloj:

Bibliografio de disertacioj pri E-o kaj interlingvistiko	159 p.	21,00
Suplemento	63 p.	7,20
Lingvistikaj aspektoj de Esperanto	76 p.	15,00

En aliaj lingvoj, elstaraj studoj: (kun resumoj en Esperanto)

The Economics of Language Use	164 p.	22,50
Language as Barrier and Bridge	141 p.	42,00
Language Behavior in International Organizations	155 p.	24,00
Language in Religion	141 p.	42,00
The Language Problem in International Relations	12 p.	2,10
Overcoming Language Barriers: The Human-Machine Relationship	112 p.	22,50

Ĉiuj prezoj estas en guldenoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

☆ eŭropa agado

❑ **La kerno de la Laborgrupo** pri la lingvoproblemo en EU preparas dokumenton celantan la Interregistaran Konferencon ĉi-jare. Ĝi traktos la problemojn en logika maniero, sekvante la postulojn de EU, kaj dissendiĝos al la Eŭropa Komisiono, al eŭro-parlamentanoj kaj diversaj organizoj.

❑ **Por la projekto Socrates** de EU Claus J. Günkel preparis projekton titolitan Neighbour ("Najbaro"); ĝiaj detaloj estas plu evoluigataj.

❑ **Eŭropa Esperanto-Unio** (ĉe kiu ĉiuj landaj asocioj de la EU-ŝtatoj reprezentigas) fartas pli bone finance nun, sed bezonas kontribuojn de la koncernaj landaj asocioj.

❑ **La "Eŭropa ĉarto** pri regionaj kaj malplimultaj lingvoj" tradukiĝis en Esperanton dank' al Seán O' Riain el Irlando, kaj espreble baldaŭ eldoniĝos.

❑ **Hans Erasmus**, gvidanto de la Laborgrupo pri la lingvoproblemo en EU, strebas — kun la helpo de Germain Pirlot — reaktivigi la deputitojn de la Eŭropa Parlamento; iuj ja favoras E-on (*Esperanto* jan., p. 11), kaj oni esperas okazigi kunvenon por ili en marto.

Tio kondukas min al la tria konstato: Ni povas uzi niajn efektivajn atingojn (anstataŭ niaj tradiciaj revoj) multe pli efike ol ni kutimas fari. Ekzemplo estas la Nitobe-Simpozio pri Lingvo en Internaciaj Organizaĵoj, kiun prezidanto Lee kaj mi nun provas organizi paralele al la UK en Prago. Universalaj Kongresoj prezentas grandiozan okazon por montri al vizitantoj la realecon de Esperanto, sed tiaj vizitantoj maloftas. Tial ni elpensis aranĝon por allogi ilin, same kiel la 13-a UK en Prago antaŭ 75 jaroj sukcesis allogi la vicĉefon de Ligo de Nacioj, d-ron Inazo Nitobe. Eĉ se ĉi tiu unua



Simpozio ne plenumus ĉiujn niajn rilatajn esperojn, ĝi montros la komencon de sekvinda vojo. Ne gravas, en la fino, ĉu la celo de nia laboro pri informado kaj eksteraj rilatoj estas vivteni nian komunumon, diskonigi ĝiajn valorojn, aŭ konvinki la mondon paroli Esperanton. La problemoj kaj la defioj estas plejparte la samaj. *Influo* do etendas inviton al ĉiu leganto, al ĉiu asocio.

En alia artikolo (p. 41) vi povas legi pri niaj

plej freŝaj kontaktoj kun la neesperantista mondo, pliaj pruvoj ke pordoj malfermiĝos antaŭ ni, se ni nur frapas pacience. Sed la frapantoj ankoraŭ tro multas. Ĉu vi aliĝos al ili?

Mark Fettes

✂ rimedoj / materialoj

Katolikismo

Italaj katolikaj esperantistoj pretigis du novajn faldfoliojn en la itala pri Internacia Katolika Unuiĝo E-ista kaj Esperanto. La dua concernas la lingvon kaj ĝian rolon kiel internacia lingvo en la katolika mondo. (*KEC-Bulteno*)

Simbolo kiu komunikas

Sveda E-Federacio
(☐ sef@esperanto.se; http://
www.esperanto.se) ekuzis novan
kampaĵo-simbolon.



Dum "@" (helika "a") simbolas elektronikan komunikadon, "@" (helika "e") laŭ SEF simbolo komunikadon inter homoj, kompreneble per Esperanto. SEF sugestas ke la simbolo neniam aperu sola, sed ĉiam kun aŭ ene de la vorto *Esperanto*.

esp@ranto

Laŭ SEF la simbolo ne anstataŭu la verdan stelon, sed funkciiu portempe, dum ekzistas granda intereso pri Interreto.

✓ aplikado

Federismo

La libro "La parlamento de la homo" de Harold S. Bidmead (N. Slottsgat. 4, NO-0157 Oslo, Norvegio), pri fundamentaj principoj de federismo, estas eldonita en aŭ tradukita al ĉiuj oficialaj lingvoj de EU, kaj aliaj. Interesitoj pri eldono en Esperanto kontaktu la aŭtoron.

Publikaj servoj

La Budapeŝta telefonlibro por 1995 enhavas fremdlingvajn informojn pri telefonado en la angla, germana, franca kaj Esperanto. (Oszkár Princz)

🏛 kulturo

Filatelio

La filatela revuo *Global Stamp News* portis en aprilo artikolon de Dr. Arthur E. Delaney pri Zamenhof kaj pri la poŝtmarkoj dediĉitaj al li. (Cornelius J. McKown)



Zamenhof-biografio

Esperanto raportis (jan., p. 19) pri rezultoj de la surmerkata kampaĵo de la Pariza eldonejo Ramsay por lanĉi la Zamenhof-biografion *L'homme qui a défié Babel* ("La homo kiu defiiis Babelon") de Henri Masson kaj René Centassi. Ni aldonu ke recenzo en *Union Pacifiste*, monata revuo — kun Esperanta angulo — de la Franca Pacisma Unuiĝo, forte rekomendas ĝin al siaj legantoj. Marie-Jeanne Liné uzis la libron por sia Esperanto-ekspozicio en la urba biblioteko de Bulonjo-sur-Mar, pri kiu artikolis la regiona taggazeto *La Voix du Nord*.

La svisa ĵurnalo *Le Matin* (Bazelo) dediĉis la 22-an de oktobro (dimanĉe) unu paĝon al Esperanto. La ĉefmaterialo, simpati-plena recenzo de Claude Bonvin, estis akompanata de kelkaj frazoj en Esperanto kaj de intervjuo kun Lilli Papaloizos, E-parolanta lingvistino kaj aŭtoro de doktora tezo analizanta la komunikadon ĉe Kultura Centro Esperantista. (*Ethnographie de la communication dans un milieu social exolingue. Le Centre Culturel Espérantiste de La Chaux-de-Fonds (Suisse)*. 1992. 254p. 99,00 gld. ĉe UEA.)

Referenclibroj

La libro *Inventos que cambiaron el mundo* ("Inventaĵoj kiuj ŝanĝis la mondon"), eldonita de Reader's Digest, mencias Esperanton ĉe la kapvorto "Vortaro". Ĝi asertas ke "la plej granda vortaro de Esperanto enhavas 160 mil vortojn" kaj ke ĝin parolas ĉ. 100 mil homoj.

Germanio

La (germanlingva) numero 7/1995 de *Esperanto aktuell*, organo de Germana E-Asocio, priskribas sur 4 paĝoj ĉiujn germanlingvajn inform-materialojn kiuj "estas nuntempe efektive disponeblaj", do, haveblaj el la centra oficejo de GEA (Immentalstr. 3, DE-79104 Freiburg). Temas pri 5 bazaj flugfolioj, 6 pli detalaj informiloj, "materialoj por praktika laboro en la E-grupoj", kaj pri konstante ĝisdatigitaj materialoj.

Britio: Televido

La 28-an de junio nokte la brita televidkanalo Channel 4 montris 45-minutan elsendon "Lingvolecionoj — la evoluo de universalaj lingvoj". Laŭ William Auld, kiu raportis en *La Brita E-isto*, la filmo insistis prezenti Esperanton — same kiel Volapukon, Interlingue, Interlingua kaj Glosa — kiel lingvon de malmoderna movado de strangaj hobiistoj.

Al Geoffrey King, laŭ sekva numero de *La Brita E-isto*, "ĝi impresis pli pozitive; la tono estis ja frivola, sed Esperanto dominis en la materialo... Kaj la plej gratulinda punkto: neniu asertis, ke la angla lingvo povas plenumi ĉiujn bezonojn de internacia lingvo!"

Britio: Radio

La finlingva servo de BBC elsendis programon pri Esperanto en julio pasintjare. Registriĝis por la programo esperantistoj en Londono kaj Budapeŝto, intervjuigis brita deputito (favora al la lingvo) kaj John Wells — same kiel iuj kiuj ne apogas la uzon de la lingvo. (*Esperantolehti*)

Belgio: Magazino

Ni raportis (jan., p. 19) pri la 5-paĝa pri-Esperanta artikolo de Lode Willems, "Taal is geen wiskunde" ("Lingvo ne estas matematiko"), kun la supertitolo "De moei-zame verspreiding van het Esperanto" ("La malfacila disvastigo de Esperanto"), en la flandra magazino *Knack*. Laŭ aktivulo Wim De Smet, ĉi tiu numero de *Knack* estis tre multe aĉetata, ĉar ĉeftemis la demisio de NATO-sekretario Willy Claes. De Smet diris ke la aŭtoro telefonis al Flandra E-Ligo preparante ĉi tiun propr-iniciatan materialon, kaj ricevis broŝurojn, kiujn li — laŭ atesto de la artikolo — trafe uzis.

Brazilo: Ĵurnaloj

Monitor Campista, kiu nomas sin "la tria plej malnova ĵurnalo" de Brazilo, en semajnfina (25-26 jun.) suplemento dediĉis unu paĝon al Esperanto, la lingvo kiu "finas la Babelan konfuzon".

Kultura paĝo de la regiona gazeto *Tribuna do Norte* (20 apr. — 5 majo) estis portugale-Esperante dulingva, kun prozaĵo, poemo kaj fotoj.

En la dua plej grava urbo de la ŝtato San-Paŭlo, Campinas, forta inform-kampanjo montris sin fruktodona, aparte ĉe unu el la universitatoj de la urbo, Unicamp. Afiŝtabuloj tra la plej grandaj avenuoj kaj aliloke anoncis (portugale): "Aktualiĝu, lernu Esperanton". Ĉi tiuj kaj alia afiŝego en restoracio atentigis la homojn. Oni daŭrigis la agadon per preĝigo de 20 mil faldfolioj pri la lingvo. (Juscelino Gama)

Britio: Ĵurnalo

La Londona *Daily Telegraph* (30 apr.) listigis tre bunte, sed apenaŭ serioze, kandidatojn por "Komuna Eŭropa Lingvo" en la artikolo "EuroBabel" de Peter Freedman. Ili estas: la angla, franca, germana, finna, latina, Esperanto, Volapuko, Ido, Solresol, Interglosa (ĉi tiuj 4 kune menciitaj) kaj Klingon. Fine sekvas traduko de artikolo el la Matriĥta Traktato en sep lingvoj (Esperanta traduko de artikolo de William Auld). (G. Kamaĉo)

Nederlando: Libro

La Amsterdama ĵurnalo *De Volkskrant* recenzis la nederlandan tradukon (*Europa en de volmaakte taal*) da la Eco-libro "La serĉado pri perfekta lingvo en la eŭropa kulturo" sub la titolo "Eco bepleit Esperanto op z'n Europees" ("Eco pledas Eŭrop-kadre por Esperanto"). La recenzanto Herman Pleij lastfrazo demandas: "Ĉu [Eco] serioze opi-

nias ke Eŭropo povas esti kuracata per la trudo de artefarita internacia helplingvo?" (Fakte, Eco ne asertas ion tiel simplisman en la verko.)

La libro ĵus aperis ankaŭ en la angla: *The Search for a Perfect Language*, ĉe la brita eldonejo Blackwell's. Ĝi sekvas la tradukojn germanan, hispanan, francan kaj nederlandan.

Rumanio: Ĵurnalo

La rumana *Adevărul de Cluj* transprenis, la 5-an de aŭgusto, la kompletan komunikon de Reuter pri la Tamperea UK: "Esperanto — o limbă neutră pentru comunicare internațională?" ("Esperanto — ĉu neŭtrala lingvo por internacia komunikado?") (Anneke Schouten-Buys)

Usono: Magazinoj

Pozitiva, longa artikolo "Not a Song nor a Salsa — 'Esperanto' Binds Ethnic Wounds with Healing Words" ("Nek kanto nek salsomuzikaĵo — Esperanto vindas etnajn vundojn per kuracaj vortoj") de Claudia Stahl en la usona *Advance for Occupational Therapists* (28 aŭg.) donis kontaktadreson de ELNA.

New Woman en marto klarigis per demandoj kaj respondoj "Kio estas Esperanto?" (titolo en Esperanto). (ELNA)

Francio: Ĵurnalo

Le Figaro Littéraire (literatura suplemento de la renomata ĵurnalo *Le Figaro*) dediĉis la 5-an de oktobro

grandformatan paĝon al Esperanto, kun tekstoj objektivaj, kiuj baziĝis sur informoj en verkoj de Pierre Janton, Umberto Eco, Claude Hagège kaj de aliaj lingvistoj. Subtitolo asertas: "La universala lingvo estas simpla, al ĉiuj alirebla, plej adaptita al la idealo kiun ĝi servas". (*Heroldo de Esperanto*)



ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza ŝtato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu internacian respondkuponon, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. *KSM* transdonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. *KSM* estas servo de UEA.



Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6
FR-55000 Longeville-en-Barrois
Francio

IĜU ĴURNALISTO PER ESPERANTO!

Nun eblas, per la koresponda kurso de TEĴA* por trejnado de ĵurnalistoj, lerni metodojn kaj praktikojn komforte hejme laŭ propra impeto!



Plenigu kaj sendu la suban kuponon al:

*TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO,
ĉe d-ro Paul Gubbins,
3 Arden Court,
Mosley, Congleton,
Cheshire CW12 3JH,
Britio.

Petu *provekzempleron*
de la faka revuo
INTERNACIA ĴURNALISTO

Bonvolu sendi al mi informojn pri la PERKORESPONDA KURSO de TEĴA por TREJNADO DE ĴURNALISTOJ.
Nomo _____
Adreso _____

Kalendaro 1996

konstante

Prof. Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb, Kroatio

Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, CN-100037 Beijing, Ĉinio; ☎+86/1/832-66-82; ✉832-18-08

Esperanto-Junularo Brandenburgio/Berlino, Berliner Str. 49, DE-14467 Potsdam, Germanio; ☎/✉+49/331/294-003, aŭ +49/30/283-43-20

Esperanto-klubo de Staszów, Parkowa 6, PL-28-200 Staszów, Pollando; ☎ Andrzej Sochacki +48/15/641-367

Esperanto — Regiona Societo, Sobotské nám. 36, SK-058 01 Poprad, Slovakio; ☎+42/92/32-419

Esptur, Tátra u. 4, HU-1061 Budapeŝt, Hungario; ☎+36/1/133-43-43; ✉268-03-31; ☐eventoj@odin.net

Grésillon: Esperantista Kulturdomo, Kastelo Grésillon, FR-49150 Baugé, Francio; ☎+33/41-89-10-34

Karlskoga Folkhögskola, Lars Forsman, Box 192, SE-691 24 Karlskoga, Svedio; ☎+46/586/50-360; ✉37-077

Kava-Pech, Anglická 878, CZ-252 29 Dobruŝkovic, Ĉeĥio; ✉+42/2/991-21-26

Kultura Centro Esperantista (KCE), BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando; ☎/✉+41/39/267-407

Monda Turismo, M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando; ☎+48/52/415-744; ✉460-082

Pavel Sittauer, Hartmannova 1128, CZ-67401 Třebíč, Ĉeĥio; ☎+42/618/21-909

WANG Yuchun, Esperanto-Asocio, Akademica Sinica, 52 Sanlihe, CN-100864 Beijing, Ĉinio; ✉+86/10/859-10-95

Sherry A. Wells, P.O. Box 1338, Royal Oak MI 48068 1238, Usono; ☎+1/313/543-52-97

marto

16-23: TEJO/KER-seminario, Conamara, Irlando (Daithí O' hÉalaithe, 54 Páirc Éabhá, Beann Éadair Co. Bh.Á.C.; ☎+353/1/832-40-87; ☐dhealy@vax1.tcd.ie; temo: "Paŝi malpeze sur la tero — junularo kaj ekologio")

21-27: Printempa festivalo, Budapeŝto, Hungario (Esptur, adreso supre)

23-24: Seminario "La bela lingvo", Karlskoga, Svedio (Märtha Andréasson, Lilla Tolsereds väg 2265, SE-425 42 Hisings Kärä; ☎/✉+46/31/571-133; kun Sten Johansson, Otto Prytz, Jon Rømmesmo, Spomenka Štímetec)

23-24: Foliumante cent jarojn de E-teatro, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre; prelegas Giorgio Silfer)

29-31: Tutkalifornia E-Konferenco, San-Francisko, Usono (Charles Galvin, 121 Cortland Ave., San Francisco CA 94110-5503; ☎+1/415/821-97-83; ✉693-93-22; ☐charlig@aol.com)

29-02: 3-a Mediteranea Internacia Ren-

kontiĝo, insulo Loŝinj, Kroatio (Kroatia E-Junulara Asocio, Amruŝeva 5/I, HR-10000 Zagreb; ☐ivica.ivaci@public.srce.hr; temo: "Fabeloj")

aprilo

01-08: 12-a Printempa Semajno Internacia kaj 2-a Printempa Lernejo Internacia, Duderstadt, Germanio (Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler; ☎+49/2641/4885; ✉2641/978-666)

03-08: Unua Albana E-Kongreso, Durrës (Trond Øgrim, Trasopvn. 12 B, NO-0671 Oslo, Norvegio; ☎+47/22-77-76-80; ☐trondog@oslonett.no)

03-09: 20-a Internacia Junulara Festivalo, Sant'Orsola Terme, Trentio, Italio (Anna Cimossa, Via Cecco Angiolieri 10, IT-10040 Druento TO; ☎+39/11/984-43-03; temo: "Disdonado kaj kontrolado de la informoj: Kiu modelo por demokrata socio?")



20-a Internacia Junulara Festivalo de Itala E-ista Junularo.

3-9 aprilo, Italio

Temo: "Disdonado kaj kontrolado de la informoj: Kiu modelo por demokrata socio?"

04-08: Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI, Kordovo, Argentino (Atilio Orellana Rojas, C.C. 1428, AR-5000 Córdoba)

05-08: 80-a Brita Kongreso de E-o, Saffron Walden (Martin Howard, Webbs Cottage, Woolpits Road, Great Salng, Braintree, Essex, CM7 5DZ Britio; ☎/✉+44/137/185-04-23)

05-08: Paska Renkontiĝo de Nederlanda kaj Flandra E-Junularoj, Doornspijk, Nederlando (David van Bezooijen, De Boogaert 28, NL-1901 GP Castricum; ☎+31/251/658-049)

06-08: 51-a Kongreso de SAT-Amikaro, Orly, Francio (SAT-Amikaro, 67 ave. Gambetta, FR-75020 Paris; ☎+33/47-97-87-05; ✉47-97-71-90; ☐sat-esp@worldnet.net)

12-14: 91-a Skota Kongreso de E-o, Aberdour, Skotlando, Britio (David Han-

nah, Belgrano, 3 The Glebe, Aberdour, Fife KY3 0UN; ☎+44/1383/860-877)

13-20: Internacia Infanrenkonto, Grésillon, Francio (adreso supre)

19-21: 8-a Alp-Adria Konferenco, Ljubljana, Slovenio (Slovenia E-Ligo, Tavčarjeva 2, Pp. 401, SI-61001 Ljubljana; ☎+386/61/315-198)

19-21: 1-a Hansa E-Tago kaj Jarkunveno de Dana E-Asocio, Ratzeburg, Germanio (Christian Darbellay, Kaiserstr. 43, DE-24143 Kiel; ☎+49/431/735-016)

19-22: Eko-Festivalo de la E-kanzono, Barra do Garças, Brazilo (Ciro Gomes de Freitas, C. P. 246, Ag. Centro, BR-78600-000 Barra do Garças — MT)

26-28: 47-a Kultura Semajnfino, Homburg, Germanio (Sarlanda E-Ligo, Pf. 2019, DE-66470 Zweibrücken; ☎+49/6332/43-843; kun Krešimir Barković, Ed Borsboom, Algis Kapiravičius, Jak Le Puil, Franz-Georg Rössler)

27: Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando (adreso en la kolofono)

27-28: Kultura monاتفino, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)

27-28: 9-a E-Renkontiĝo de Porto Alegre, Brazilo (Esperantista Societo, C.P. 1415, BR-90001-970 Porto Alegre — RS; ☎+55/51/344-25-91)

27-05: 10-a Ĝenerala Konferenco de "Monda Turismo" kaj 21-aj E-Tagoj de Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo, adreso supre)

majo

03-05: Printempa E-ista Renkontiĝo en Altaj Tatroj, Slovakio (Esperanto — Regiona Societo, adreso supre)

03-06: 29-a Tutlanda Kunloĝado, Tokio, Japanio (Japana E-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, JP-162 Tokio; ☎+81/3/32-03-45-81; ✉32-03-45-82; ☐chb71944@pcvan.or.jp)

09-12: Krakova Festivalo de la Esperanta Kulturo, Pollando (Grażyna Maszczyńska-Góra, ul. Armii Krajowej 2/14, PL-31-150 Kraków)

10-12: Jarkongreso de Sveda E-Federacio, Katrineholm, Svedio (Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, SE-113 42 Stockholm; ☎+46/8/340-800; ✉340-810)

11-12: Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI, Zagrebo, Kroatio (Prof. Bekavac-Basić, adreso supre)

11-18: 48-a Kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio, Hago, Nederlando (48-a IFEF-Kongreso, Postbus 11686, NL-2502 AR Den Haag; temo: "La evoluo de trafik-regado en Amsterdamo")

12: Internacia E-Renkontiĝo en la "eŭ-regiono" Mozo-Rejno, Stokkem, Belgio (Jan Bovendeerd, Veenmosstraat 3, BE-3650 Dilsen-Stokkem; ☎+32/89/659-582)

15-19: Cseh-metodika seminario, B-kurso, sud-okcidenta Pollando (E-Junularo Brandenburgio/Berlino, adreso supre; instruas Katalin Smidélíusz)

16-19: 88-a Franca Kongreso de E-o kaj Internacia junulara renkontiĝo "La Festo", Villeurbanne cĉ Liono, Francio (CERL, 7 rue Major-Martin, FR-69001 Lyon;

- ☎/☎+33/78-83-67-08; por "La Festo": Bruno Flochon, Ch. du Maure, FR-69280 Sainte-Consorce; ☎+33/78-87-02-51)
- 23-29: **Ripoza renkontiĝo**, Staszów, Pollando (E-klubo Staszów, adreso supre)
- 24-27: **73-a Germana E-Kongreso**, Augsburg, Germanio (Bavara E-Ligo, Waterloostr. 21, DE-86165 Augsburg; ☎+49/821/792-835; ☎713-074)
- 24-27: **Pentekosta tendaro**, Liegnitzsee ĉe Berlino, Germanio (E-Junularo Brandenburgio/Berlino, adreso supre)
- 24-27: **Antwerpen '96**, kultura kaj turisma renkontiĝo, Antverpeno, Belgio (Flandra E-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen; ☎+32/3/234-34-00; ☎233-54-33; ☎fel@knooppunt.be)
- 25-27: **Esperanto-staĝo**, Le Pouligen, Francio (Martine Rivière, 7 chemin de la Viollerie, FR-44300 Nantes; ☎+33/40-25-24-05)
- 25-27: **Granda kultura monاتفino**, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)
- 25-25 junio: **Blankaj noktoj**, kvintagaj restadoj, Sankt-Peterburgo, Rusio (Svetlana Ejst, ul. Partizana Germana 15-1-98, RU-198329 Sankt-Peterburg; ☎vladimir@bespalov.black.sochi.su)
- 27-02: **Pola sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj**, Staszów, Pollando (E-klubo, adreso supre)
- 27-02: **12-a Flaŭrista Semajno**, Mittelwihl, Francio (Ru Bossong, Floraplein 23, NL-5644 JS Eindhoven, Nederlando; ☎+31/40/211-41-62)
- 28-30: **6-a Praga internacia konferenco pri kibernetika pedagogio EDUTECH '96**, Ĉeĥio (Kava-Pech, adreso supre)
- 29-02: **10-aj E-Tagoj de Staszów**, Pollando (E-klubo, adreso supre)
- 31-02: **Printempo de la lingvoj**, Tuluzo, Francio (E-Kulturcentro, 1 rue Jean Aillet, FR-31000 Toulouse; ☎+33/61-25-55-77)

junio

- 07-09: **"Venu kaj aĉetu"**, seminario de komercistoj, Poprad, Slovakio (E-Regiona Societo, adreso supre)
- 07-09: **Faka seminario pri financado de E-projektoj**, Glienicke ĉe Berlino, Germanio (E-Junularo Brandenburgio/Berlino, adreso supre)
- 08-09: **Unua Sciencteknika Seminario de Tutmonda Asocio de Konstruistoj E-istaj**, Colmar, Francio (TAKE, RN83, Rue du Tiefenbach, FR-68920 Wintzenheim, Colmar; ☎+33/89-80-11-17; ☎89-79-43-33; ☎100623.3022@compuserve.com)
- 08-10: **16-a Renkontiĝo de Portugalaj E-istoj**, Guimarães, Portugalio (Portugala E-Asocio, Rua Dr. João Couto 6, r/c A, PT-1500 Lisboa; ☎+351/1/714-13-59; ☎bacano@cc.fc.ul.pt)
- 09-15: **18-a Ĉebalta E-ista Printempo**, Mielno, Pollando (Filio de Pola E-Asocio en Koszalin, skr. poczt. 30, PL-75-016 Koszalin)
- 10-15: **Somera kurso**, diversaj niveloj, Karl-

skoga, Svedio (Karlskoga, adreso supre)

- 13-16: **16-a Internacia Renkontiĝo de Popolaj Orkestroj**, Toruń, Pollando (Muzeum Etnograficzne, Wały Gen. Sikorskiego 19, PL-87-100 Toruń; kun uzo de Esperanto kiel pontlingvo)
- 20-06: **Kursoj por komencantoj kaj lertuloj**, Grésillon, Francio (adreso supre)
- 21-23: **19-a E-Seminario de Baden-Virtemberga E-Ligo kaj Kurso pri terminfarado**, Rastatt, Germanio (Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, DE-78050 Villingen; ☎+49/7721/22-073; ☎22-074)

21-27: La antaŭe programita **Unua Internacia E-ista Festivalo "Romeo kaj Julieta"** ne okazos pro teknikaj kaŭzoj. La organizantoj pardonpetas.

- 22-23: **Kongreso de E-istoj en Kansajo**, Toyonaka, Japanio (Kansaja Ligo de E-Grupoj, Sone-higasimati 1-11-46-204, Toyonaka-si 561; ☎/☎+81/6/841-19-28)
- 24-28: **3-a Internacia E-Semajno**, Tampere, Finnlando (E-Societo "Antaŭen", Teivaalantie 85, FI-33400 Tampere; ☎+358/31/346-34-93; instruas Stefan MacGill kaj Gennadi Leontjev)
- 24-28: **Intensaj E-kursoj 30-horaj**, Detrojto, Usono (S.A. Wells, adreso supre)
- 24-12: **27-a Somera kursaro**, San-Francisko, Usono (Cathy Schulze, 410 Darrell Rd., Hillsborough CA 94010; ☎+1/415/342-17-96; instruas Derek Roff, Katalin Smideliusz, Hisasi Kitagawa kaj Dorothy Stermer)



Hungaria E-ista Semajno, 29 junio - 5 julio, Hungario

- 25-01: **Seminario "Esperanto kaj naturo"**, Võsu, Estonio (August Kilk, Mere 83-3, EE-2126 Võsu)
- 27-30: **Freŝo '96**, Olsztyn, Pollando (Andrzej Gielert, Skrytka 861, ul. Murzynowskiego 22/27, PL-10-684 Olsztyn)
- 28-30: **Korea Tutlanda Renkontiĝo**, Taejon (Korea E-Asocio, C.P.O. Kesto 4258, Seoul — 100-642; ☎+82/2/614-57-84; ☎614-57-85; ☎keast@soback.kornet.nm.kr)
- 29-30: **Kultura monاتفino**, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)
- 29-05: **Hungaria E-ista Semajno**, Budapeŝto (Espertur, adreso supre; temo: "Turismo kaj komunikado")
- 29-08: **Internacia E-Somerlernejo kaj Mazikurso por komencantoj**, Zagrebo,

Kroatio (Prof. Bekavac-Basić, adreso supre)

- 29-13: **Internaciaj E-Renkontoj**, Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo, adreso supre)
- 30-13: **Somera E-Tendaro**, Lančov, Ĉeĥio (P. Sittauer, adreso supre) kaj **Ferioj kaj Esperanto por 7-12-jaruloj** (E-Junularo Brandenburgio/Berlino, adreso supre)

julio

- 01-05: **28-a Somera Studsemajno**, Jyväskylä, Finnlando (Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, FI-40630 Jyväskylä; ☎+358/41/254-609; instruas Stefan MacGill)
- 05-10: **32-a Brazilia Kongreso de Esperanto**, Ribeirão Preto (KCE, Rua Americo Brasiense 1450, BR-14015-050 Ribeirão Preto — SP; temo: "Labori por E-o estas labori por paca mondo")
- 05-10: **15-a Internacia Literatura Forumo**, Szombathely, Hungario (Esperanta PEN-Centro, Pf 117, HU-1581 Budapest; ☎+36/1/252-43-96; temo: "Teatro en Esperanto")
- 06-13: **Naturumado en la montaro Börzsöny**, Hungario (Espertur, adreso supre)
- 07-13: **E-kursoj ĉe la Universitato de Hartford**, Usono (Hilda Grossman, 200 Bloomfield Ave., West Hartford, CT 06117; ☎+1/800/234-44-12; instruas Joseph Conroy, Boris Kolker, Spomenka Štimec)
- 07-13: **Kursoj por komencantoj (1-a parto) kaj praktikantoj kaj Studo de la franca lingvo pere de E-o**, Grésillon, Francio (adreso supre; gvidas Jeannine Vincent)
- 07-14: **Somera E-ista Familia/Feria Tendaro**, Thomsdorf, Germanio (Werner Pfennig, Uns Hüsung 29/1104, DE-17034 Neubrandenburg; ☎+49/395/422-13-98)
- 08-12: **Intensaj E-kursoj 30-horaj**, Detrojto, Usono (S.A. Wells, adreso supre)
- 10-16: **Lingvokurso ĉe Balatono**, Hungario, (Espertur, adreso supre)
- 12-15: **44-a Kongreso de E-Ligo por Norda Ameriko**, Detrojto, Usono (E-Societo Miĉigana, P.O.B 3011, Southfield MI-48037-3011)
- 12-17: **55-a Hispana E-Kongreso**, Alquerias-Murcia, Hispanio (Asocio Ĉielarko, Gregorio Mtnes Montesinos 3, ES-30580 Alquerias-Murcia)
- 12-18: **Internacia E-Konferenco**, Slovakio (Eric Laubacher, 1 rue des Vosges, FR-78100 Montigny le Bretonneux, Francio; ☎+33/1/30-96-67-91; ☎ericl@frmug.fr.net; temo: "Esperanto kaj imperiaj lingvoj en internacia uzado")
- 13-15: **14-a Internacia Somera E-Universitato**, Veliko Tarnovo, Bulgario (Jordanka Nikolova Ivanova, PK 6, bul. Bulgario 15, BG-5000 Veliko Tarnovo)
- 13-20: **69-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda**, Sankt-Peterburgo, Rusio (SAT, 67 ave. Gambetta, FR-75020 Paris; ☎+33/1/47-97-87-05; ☎47-97-71-90; ☎sat-esp@worldnet.net; temo: "Nacia kaj monda kulturoj: Rigardo de ekstere kaj de interne")

Vizitu vian propran domon ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo dum

MALFERMA TAGO

sabaton la 27-an de aprilo 1996 (10h00 – 17h00)

- ★ Konatiĝu kun la domo kaj ĝiaj laborantoj
- ★ Senhalsa prezentado de Esperanto-filmoj
- ★ Aĉetante en la libroservo, vi ĝuos rabaton de 10% (kaj ŝparos la sendokoston)
- ★ Senpaga loterio
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj



- 14-18: 2-a Eŭropa Medicina E-Konferenco, Hódmezővásárhely, Hungario (Katalin Faragó, p.k. 89, HU-6801 Hódmezővásárhely; ☎+36/62/344-211; ☎342-786; temo: "Medikamentoj")
- 14-20: Moravia folkloro al la mondo, antaŭkongreso de la 81-a UK, Brno, Ĉeĥio (Kava-Pech, adreso supre)
- 14-21: Kursoj por komencantoj (2-a parto), praktikantoj kaj lertuloj, Grésillon, Francio (adreso supre; gvidas Jeannine Vincent)
- 14-27: Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥio (P. Sittauer, adreso supre)
- 15-19: Karpata Renkonto "Carpathi '96" kaj 6-a Eŭropa E-Forumo, Poprad-Bratislava, Slovakio (Esperanto — Regiona Societo, adreso supre)
- 15-21: Internacia Esperanta somera semajno por geknaboj kaj gejunuloj kaj Simpozio pri kompilado de Esperantaj lernolibroj kaj didaktiko, Pekino, Ĉinio (Wang, adreso supre)
- 16-21: Konversacia kurso por progresantoj kaj Enkonduko al refleksologio, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre; gvidas Mónika Molnár resp. Noëlle Weyeneth)
- 20-26: 62-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj, Prago, Ĉeĥio (Jiří Vychodil, Žandovská 304, CZ-190 31 Praha 9)
- 20-27: 81-a Universala Kongreso de Esperanto, Prago, Ĉeĥio (CO de UEA, adreso en la kolofono; temo: "Kulturo: valoro aŭ varo?"), kaj samtempe: Infana Kongreseto (Christopher Fettes, St Columba's College, Whitechurch, Dublin 16, Irlando; ☎+353/1/493-19-84; ☎493-66-55)
- 20-28: ICEM Esperanto-Renkonto de Freinet-pedagogoj, Krościenko, Pollando (Felicja Kostów, ul. Krótka 38, PL-43-190 Mikołów)
- 21-28: Kursoj por komencantoj (1-a parto) kaj praktikantoj, Grésillon, Francio (adreso supre; temo: "Gramatiko"; gvidas André Cherpillod)
- 24-31: 16-a Sanmarineca Universitata Sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj, Prago, Ĉeĥio, lige al la 81-a UK (AIS, Sekretariejo, Kleinenberger Weg 16b, DE-33100 Paderborn, Germanio; ☎+49/5251/64-200)
- 27-31: Internacia seminario pri modernigo de Esperanto-instruado, Maribor, Slovenio (Inter-Kulturo, Besednjakova 1, SI-62000 Maribor; ☎/☎+386/62/100-669)
- 27-02: 30-a Konferenco de Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj, Tábor, Ĉeĥio, kaj samtempe 4-a Gimnazio de ILEI por geknaboj de 13-16 jaroj (Bertil Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; temo: "Rimedo por bona lernado kaj memlernado de E-o")
- 27-02: 3-a Interreligia Seminario E-ista, proksime al Prago, Ĉeĥio (Pavla Dvořáková, Ostravska 637, CZ-199 00 Praha 9; ☎/☎+42/2/899-602)
- 27-03: 12-a Ekumena Kongreso, samtempe 46-a Kongreso de Kristana E-ista Ligo Internacia kaj 50-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo E-ista, Szombathely, Hungario (Sac. Lajos Kóbor, Fő u. 61, HU-9484 Pészsteg, por IKUE; Éva Farkas-Tatár, Dohány u. 36/II/2, HU-1077 Budapest, por KELI; temo: "Konservado de la kreitaro")
- 27-03: Gastama Hungario, Budapeŝto (Esperetur, adreso supre)
- 27-04: 18-a Renkontiĝo de E-istaj Familioj, dume (1-2 aŭg.) seminario Multkulturaj familioj en la nuna Eŭropo, Bratislavo, Slovakio (Jozef Reinart, Gallmeyergasse 6/1/4, AT-1190 Wien, Aŭstrio; ☎+43/1/363-08-33; ☎368-94-34)
- 28-04: Kursoj por komencantoj (2-a parto) kaj praktikantoj, Grésillon, Francio (adreso supre; temo: "La arto traduki", gvidas Georges Lagrange)
- 28-10: Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥio (P. Sittauer, adreso supre)
- 29-05: 52-a Internacia Junulara Kongreso, Güntersberge, Germanio (Holger Boos, Kräuterweg 25, DE-51069 Köln; ☎+49/221/685-597; ☎a2659212@mail.rz.uni-koeln.de; temo: "Formoj de kunvivado")
- 29-05: 18-aj Turismaj Tagoj, Žilina, Slovakio (Juraj Gondžúr, Levočská 3, SK-010 08 Žilina)
- 30-04: Konversacia kurso por progresantoj kaj Komparado de instrumentadoj en E-o, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre; gvidas Mónika Molnár resp. Claude Gacond)
- aŭgusto**
- 02-10: 32-aj Baltiaj E-Tagoj, Jūrmala, Latvio (Latvia E-Asocio, p/k 150 Rīga, LV-1050 Latvio; ☎+371/2/293-988; ☎+371/883-02-75)
- 03-16: Somera E-Lernejo, Poprad, Slovakio (E-Regiona Societo, adreso supre)
- 03-17: 15-a Katolika E-Tendaro, Sebranice, Ĉeĥio (Pavel Brada, CZ-783 75 Dub nad Moravou 127)
- 04-11: Kursoj por komencantoj (1-a parto), praktikantoj kaj lertuloj, Grésillon, Francio (adreso supre)
- 06-09: 15-a Komuna Seminario de aziaj gejunuloj, gubernio Okayama, Japanio (Tai Hisayuki, Meitu Kawaguti 705, Hon-mati 2-5-15, Kawaguti-si, Saitama, 322, Japanio; ☎/☎+81/75/702-72-09; ☎jei@kyoryu.scphys.kyoto-u.ac.jp; temo: "Elhaŭtiĝu, krokodiloj!")
- 06-11: 5-a Kultura E-Festivalo, kun Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI, Kopenhago, Danio (Jacob Nordfalk, Rådmandsgade 53, 2. th., DK-2200 København N; ☎+45/31-83-82-20; ☎35-52-04-60; ☎nordfalk@cats.nbi.dk)
- 06-11: Konversacia kurso por progresantoj kaj Enkonduko al grafologio, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre; gvidas Mónika Molnár resp. Lucia Benedos)
- 09-10: 83-a Japana E-Kongreso, Hiroŝimo, Japanio (Komitato de la 83-a JEK, Ōgonzan-tyō 7-15, Minami-ku, Hiroshima-si, 734)
- 10-16: 36-a Internacia Somera Lernejo, Barlaston, Britio (Paul Gubbins, 3 Arden Court, Mossley, Congleton, CW12 3JH)
- 11-17: E-semajno pri Martinus-kosmologio, Klint, Danio (Martinus-Instituto, Mariendalsvej 96, DK-2000 København F.; ☎+45/38-34-62-80; ☎38-34-61-80)
- 11-17: Ejselmera migra aventuro, velsipa migrado en Nederlando (Bert de Wit, Postbus 6425, NL-2001 HK Haarlem; ☎+31/23/524-26-43)
- 11-17: Somera refreŝiga restado en Lančov, Ĉeĥio (P. Sittauer, adreso supre)
- 11-18: Kursoj por komencantoj (2-a parto), praktikantoj kaj lertuloj, Grésillon, Francio (adreso supre)
- 13-19: 10-a Internacia Junulara Semajno, Hungario (Pálma Csiszár, Erdődy Pálffy Tamás u. 25.V.16, HU-8100 Várpalota; ☎hallo356@osiris.elte.hu; temo: "Olimpikaj ludoj")
- 16-20: Somera semajno de ĉinaj junaj e-istoj, Kunshan apud Ŝanhajo, Ĉinio (Ĉina E-Ligo, adreso supre)
- 17-23: Turisma Semajno en Altaj Tatroj, Poprad, Slovakio (Esperanto — Regiona Societo, adreso supre)

- 18-25: Kursoj por praktikantoj kaj lertuloj, Grésillon, Francio (adreso supre)
- 19 aŭg. - 11 okt.: Oksemajna kurso por komencantoj, Karlskoga, Svedio (Karlskoga, adreso supre)
- 22-25: Unua Azia Kongreso de E-o, Ŝanhajo, Ĉinio (Wei Yuan-shu, 550 Dalian Road (w), CN-200083 Shanghai; ☎+86/21/65-42-33-39, ☎65-42-79-00; temo: "Azio kaj la 21-a jarcento")
- 23-30: Unua E-kongreso de la Hinda Oceano kaj Orient-Afrikan landoj, Antananarivo, Madagaskaro (Esperanto en Malagasio, Lgt. 387, Cité Analamahitsy, MG-101 Antananarivo; temo: "E-o kaj komunikado")
- 24-30: 65-a Itala Kongreso, Ferrara (Edvige Ackermann, via Valerio 110-A, IT-34128 Trieste; ☎/☎+39/40/350-093; temo: "La internacia komunikado en la malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj")

septembro

- 01-08: 17-a Sanmarineca Universitata Sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj, Rimini, Italio, kaj San-Marino (AIS, Sekretariejo, Kleinenberger Weg 16b, DE-33100 Paderborn, Germanio; ☎+49/5251/64-200)
- 02-07: 5-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en E-o (temo: "La 21-a jarcento — nova periodo de scienca kaj teknika evoluo") kaj

- 03-23: Internacia kurso de akupunkturo kaj masaĝo, ambaŭ: Pekino, Ĉinio (Wang, adreso supre)



52-a Internacia Junulara Kongreso. 29 julio - 5 aŭgusto, Germanio Temo: "Formoj de kunvivado"

- 20-22: Internacia Amikeca Renkontiĝo en la Markola Regiono, Maidstone, Kent, Britio (Helga Rapley, 17 The Grange, Shepherdswood, Dover, Kent, CT15 7QB; temoj: "Antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto", "Du tendencoj: Esperanto inter finvenkismo kaj raŭmismo"; gvidas Gian Carlo Fighiera)
- 21-29: 22-a Internacia Foiro de E-turismo,

- Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo, adreso supre)
- 28-05: Gastama Hungario, Budapeŝto (Esperanto, adreso supre)

oktobro

- 05-12: 4-a Internacia Kultura kaj Turisma E-Semajno, Calella ĉe Barcelono, Katalunio (Hispana Fervojista E-Asocio, Apartado 15027, ES-08080 Barcelona, Hispanio)
- 21 okt. - 20 dec.: Oksemajna kurso por progresantoj, Karlskoga, Svedio (Karlskoga, adreso supre)
- 25-27: 28-a Korea Kongreso de Esperanto, Seulo (Korea E-Asocio, C.P.O. Kesto 4258, Seoul - 100-642; ☎+82/2/614-57-84; ☎614-57-85; ☐keast@soback.kornet.nm.kr)
- 29-03: 10-a Konferenco de Komunista E-ista Kolektivo, Lisbono, Portugalio (KEK, Rua Paula Lopes, 1, 2º esq. Aqualva, PT-2735 Cacém)

novembro

- 01-03: 2-a Internacia Kolokvo pri Interlingvistiko, CDELI, La Chaux-de-Fonds, Svislando (d-ro Tazio Carlevaro, Viale G. Motta 32, CH-6500 Bellinzona; ☎+41/91/825-29-88; ☎825-95-59; temo: "Esplorkampoj de aplikita interlingvistiko"; ĉefprelegas Detlev Blanke; lingvoj: angla, Esperanto, franca, germana, itala)

OFICIALA INFORMILO

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Meksiko: Julie L. Regal.

AMIKOJ (minimumo \$10): Aŭstralio: Owen Loneragan; Stan J. Bruton; Teresa M. Metherall. Usono: Annette Greenland; D. Gary Grady; Henry L. Ginn; Pauline Ledeen; Ronald J. Glossop; Steven E. Sorenson.

PATRONOJ DE TEJO 1996

Britio: Martyn Hugh McClelland. Francio: Michel Cavelan; Bérengère Cheverry; Claude Longue-Epée; Gaston Fournier; Jean Dalet; Odile Masseron; Philippe Berizzi; Philippe Chappe; Paulette Naulet; Roger Despiney; Frato René-Jean Mar-mou; Yvette Nicaise-Pierre. Germanio: Franz Knöferl. Hispanio: Paco Belmonte. Italio: Lidia Neri Lami. Japanio: Hirotugu Hukamoto; Ikuko Kitagawa-Yazima; Bun'iti Isizaki; Zyun'iti Sibayama; Kazuyuki Hosomi; Koichi Kai; Utako Kobayasi; Hiroo Kodama. Kanado: Stevens T. Norvell Jr. Litovio: Povilas Jegorovas. Nederlando: F.J. Pieterse-Kruger. Usono: E. Williger; D. Gary Grady; L.A. Walther; Rebecca Harris.

SOCIETO ZAMENHOF 1996

Aŭstralio: Jean A. Lehan; Marjorie Ellyard; Stan J. Bruton; Teresa M. Metherall. Belgio: A. Mertens Goossens; Luc Duchateau; Karel Van Steenberghe; Jos Vandenberg. Britio: E.E. Mallett. Francio: André Albault; Blaise Berthonneau; Claude Longue-Epée; Eloi Thiollière; Féodor Jelenc; Hélène Gauducheau; Jean-Paul Beau; Louise Marin; Odette Berner; Roger Despiney; Julien Ducrocq; Raymonde Perault. Germanio: Helmut Welger; Helmut Klünder; Richard Schulz; Peter Weide. Hispanio: L.E. Hernández García; R. Uruña de Hernández. Italio: Lidia Neri Lami.

Japanio: Hirotugu Hukamoto; Bun'iti Isizaki; Kazuyuki Hosomi; Ivao Katō; S-ro KUROYANAGI Yositaka; Akira Morita; Keniti Matumoto; Kyōhei Nakazima; S-ro OSAKI Kazuo; Ōsōi Satō; Takeo Sugano; Yosikazu Takeuti; Toyozo Nisikawa; S-ro YAMASAKI Seikō. Kanado: Bruce R. Crisp; Stevens T. Norvell Jr. Litovio: Povilas Jegorovas. Luksemburgio: Brian R. Moon; Claude Nourmont. Meksiko: Julie L. Regal. Svedio: Agneta Emanuelsson; Inga-Maj Lindkvist; K.G. Lennart Lagerkrantz; Malte Gahlin; Tore Johansson. Svislando: David Cohen; S. Kaufmann; François Randin. Usono: Bruce Arne Sherwood; David Wolff; Doris Vallon-Wheeler; D. Gary Grady; Humphrey Tonkin; Jane Edwards; Margaret L. Barkley; Robert A. Swenson; Solomon D. Helfgot; Sidney S. Culbert.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Finnlando: Sakari Kauppinen.

DONACOJ 1996 (gld.)

ĝis la 31-a de januaro

Fondaĵo Afriko: Finnlando: A.-L. Ali-Simola 11,07. Nederlando: F.J. Pieterse-Kruger 50,00. Sumo ĉi-jara 61,07.

Fondaĵo Canuto: Francio: J.J. Aumeunier 55,24; J. Ducrocq 243,59; L. Marin 81,20; M. Massemin 42,22; O. Masseron 32,48; G. Treanton 12,99; J.-C. Trebuet 16,24. Germanio: W. Heinrich 558,73. Japanio (por aziaj e-istoj): H. Abe 62,70; K. Hirose 62,70; M. Hirotaka 31,35; H. Hukamoto 156,75; K. Huzimaki 31,35; H. Imaizumi 94,05; M. Itabasi 47,02; A. Itagaki 31,35; Y. Ito 78,37; T. Iwamoto 31,35; K. Kai 62,70; T. Kawai 31,35; K. Kazawa 31,35; T. Konisi 31,35; H. Kumaki 31,10; Y. Maeda 62,70; H. Matumoto

62,70; T. Matumoto 62,70; MINE Y. 62,70; H. Murakami 62,70; I. Miyamoto 47,03; S. Miyamoto 62,70; M. Nakatu 62,70; T. Nakamiti 31,35; T. Nisikawa 77,75; T. Nisio 31,35; M. Niwa 156,75; T. Nomura 31,35; H. Okuda 31,35; S. Okutu 156,25; S. Oonisi 31,35; Y. Oosaki 62,20; T. Saitou 62,70; S. Sakamoto 62,70; K. Sasanuma 62,70; H. Seki 31,35; Z. Sibayama 156,20; Sikoku E-Renmei 31,35; T. Somekawa 31,35; T. Suzuki 155,50; H. Takubo 62,70; E-Rondo de Tomakomai 31,35; S. Turuta 62,70; YAMASAKI S. 31,10; Y. Yazaki 62,70. Luksemburgio: B. Moon 200,00. Nederlando: A.W. Treurniet 68,00; S.v. Wijngaarden 100,00. Nov-Zelando: D. Dewar 41,60. Svedio: U. Luin 100,00. Diversaj malgrandaj 11,50. Sumo ĉi-jara 4318,66.

Ĝenerala Kaso: Britio: E. E. Mallett 59,52. Germanio: C. Darbellay 14,55. Japanio: anonime 3135,00. Nederlando: D. Krombeen 100,00. Usono: P. Ledeen 24,00; S.E. Sorenson 32,20. Diversaj malgrandaj 8,20. Sumo ĉi-jara 3373,47.

Konto Espero: Francio: A. Amice 64,96; J. Ducrocq 324,78; S. Humm 32,48; L. Marin 81,19; G. Treanton 12,99; J.-C. Trebuet 32,47. Usono: Prenda Cook 32,20. Sumo ĉi-jara 581,07.


Triamonda Kongresa Fondaĵo: Germanio: F.J. Braun 40,00. M. Westermayer 25,00. Luksemburgio: B. Moon 135,00. Nederlando: F.J. Pieterse-Kruger 50,00. Pollando: K. Babiarsz 58,00. Svislando: E. Lauper 30,00. Diversaj malgrandaj 5,00. Sumo ĉi-jara 343,00.

Volontula Fondaĵo: Nederlando: A. Putter-Demmendaal 30,00. Sumo ĉi-jara 30,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Laste aperis



Almanako Lorenz 1996. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1996. 97p. 21cm. Artikoloj, eseoj kaj poemoj plejparte spiritismaj. 5,10 gld.

Aspects of Internationalism. Language & Culture. Red. Ian M. Richmond. Kontribuis J.F. Cool, J. Edwards, M. Lee, S. Levin, I.M. Richmond, H. Tonkin. Lanham/New York/London — Rotterdam/Hartford: University Press of America/CED, 1993. 151p. ISBN 0-8191-8859-X. 24cm. Anglalingva, kun Esperantaj resumoj. Bind. Konferencaj kontribuoj pri Esperanto kiel ilo aŭ temo de scienca esplorado. 60,00 gld.

10-a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco. Sciencaj resumoj. Programo. Red. Igor Galajčuk. Ternopil: Lileja, 1995. 108p. 20cm. 7,50 gld.

Dekamerono. Unuaj tri tagoj. Giovanni Boccaccio (1313-1375). El la itala trad. Perla Martinelli kaj Gaston Waringhien. Prilly (Lausanne): Kooperativo de Literatura Foiro, 1995. 320p. ISBN 3-906595-10-2. 22cm. Bind. Antaŭparolo de Mario Luzi. La unua triono de cent-era novelaro, "la plej alta kaj plej ampleksa proza evento de la itala mezepoko" (Carlo Minnaja), heroldanta la renesancon. 76,50 gld.

Fabeloj de mia avino. Hasan Jakub Hasan (1964). Sofia: Bulgara E-Asocio, 1995. 32p. ISBN 954-8703-03-3. 21cm. Turkaj popolfabeloj el Norda Bulgario. 6,00 gld.

Grand dictionnaire Espéranto-Français. Gaston Waringhien (1901-1991). Paris: SAT-Amikaro, 1994. 443p. ISBN 2-9508809-0-8. 19cm. Bind. Tria eldono reviziita kaj pliampleksigita de André Albault kaj Paul Signoret, kun ĉ. 1600 aldonaj radikoj. 57,00 gld.


Informaciestetiko — Kibernetika estetiko — Estetik kibernetiko. Prof. Dr. Helmar Frank (1933). Dulingva: E-germana. Sibiu: Ed. Univ. "Lucian Blaga", 1995. 68p. ISBN

973-95604-1-4. 20cm. Pri nova branĉo de kibernetiko. 15,00 gld.

Kvara templo, La. Jiĉhak Ĥajutman. Jerusalem: Centro Sivron, 5755/1995. 5p. 21cm. Pri rekonstruado de la juda Templo en nia tempo. 1,80 gld.

Ludanta lumo, La. Kvin erotikaj rakontoj. Leopold Vermeiren. El la nederlanda trad. Cor Willems. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1995. 93p. ISBN 90-71205-57-6. 20cm. Daŭrigo de la kolekto *La nuda feino*, tamen ĝuebla kiel aparta verko. 24,90 gld.

Lumo de l' espero. Divaldo Pereira Franco. El la portugala trad. Délio Pereira de Souza. Rio de Janeiro: Spirita Eldona



La ama laboro de Perla Martinelli kaj LF-koop vekis el la tirkestoj de Waringhien klasikaĵon, kiu origine devus aperi por la Roma UK (1935).

Societo F.V. Lorenz, 1995. 116p. 21cm. Spiritisma volumo "por helpi tiujn kiuj troviĝas en la ombroj de malekvilibro". 8,70 gld.

Montru al mi ĝustan vojon. Bogusław Sobol (1935). Toruń: Flamo, 1994. 15p. 15cm. Dek kvar piaj poemoj. 2,40 gld.

Paco en ŝtormo (1976). Marc A. Rohrbach (1904-1993). El la franca trad. JEAN-amikaro. Svislando: Kooperativo de Literatura Foiro, 1994. 153p. ISBN 3-906595-07-2. 21cm. Kiel eviti malekvilibron en mutacianta mondo. 28,80 gld.

Politica comunitaria dell'educazione, della cultura e della gioventù e la politica delle lingue dell'U.N.E.S.C.O viste da un federalista, La. Andrea Chiti-Batelli. Roma: la aŭtoro, 1995. 29p. 21cm. Itallingva. Tri kritikaj artikoloj pri la kultur- kaj lingvopolitiko de la Eŭropa Unio kaj de Unesco. 4,20 gld.

Por ĝuste uzi Esperanton. Marcel Leereveld. Bakers Hill & Beverley WA: Bookleaf Publishing, 1995. 66p. ISBN 0-646-23638-5. 30cm. "Diversspecaj lumigoj de interesaj E-gramatikaĵoj", aperintaj en E-gazetoj "por la daŭra pureco de nia lingvo". 26,70 gld.

Ruslanda esperantista jarlibreto 1995. Kompilis H. Gorecka. Moskvo/Jekaterinburg: REU/Ruslanda Esperantisto, 1995. 16p. 21cm. Listo de membroj, kluboj, kursoj, gazetoj ks. 3,60 gld.

Sopiro al puraj fontoj. Kazimjeŝ Ŝĉurek (1925). 1994. 48p. 23x8cm. Poemoj originalaj kaj tradukitaj, plej diversformaj. La poemaro ŝajnas "ĉenero liganta la paseon kun la moderna nuntempo" (Z. Glajcar). 3,30 gld.

Vekiĝu Ĵuliana! Cléo de Albuquerque Mello. El la portugala trad. Marilza Oliveira da Silva, Jair Salles. Rio de Janeiro: Centro Espirita Léon Denis, 1995. 40p. ISBN 85-7297-052-5. 21cm. Ekzerca kaj koloriga libreto por infanoj. 12,00 gld.

Verda radio, La (1882). Jules Verne (1828-1905). El la franca trad. Jeannine Vincent. Paris: UFE, 1995. 52p. 21cm. Tria parto. En la tipa sfero de angla banloko la alloga Elisabeth kaj ŝiaj du strangulaj onkloj senlace serĉas la originon de mistera verda lumradio. 10,80 gld.

Wurden = Vortoj. Albert Hoekstra (1934). De Jouwer: E-Studgrupo, 1995. 115p. 21cm. La unua E-vortaro por frisoj. Kun ĉ. 8000 vortoj en la frisa-E parto kaj ĉ. 2000 en la E-frisa. 15,00 gld.

DIVERSAĴOJ

Komputila disko: Wurden = Vortoj: Wurddiskette Esperanto-Frysk. Vortardisketo Frisa-Esperanto. Vd. ĉi-supre. Por MS DOS 3, 4, 5, 6. 15,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

19-a Esperantologia Konferenco

Ĝis hodiaŭ renkonteblas en certaj ne-esperantistaj rondoj la aserto ke Esperanto ne havas kulturon, ke ĝi estas senkultura lingvo ktp. Reage al tio la 19-a Esperantologia Konferenco, okazonta en la 81-a UK en Prago, havos la kadran temon "Esperanto kaj kulturo — sociaj kaj lingvaj aspektoj". La temon oni traktos en tri partoj:

1. Kiel karakterizi la Esperantan lingvo-komunumon?
2. Kio estas Esperanta kulturo kaj kiel ĝi lingve reflektiĝas?
3. Trajtoj de kulturpolitiko de la Esperanta lingvo-komunumo.

Pliajn informojn donas kaj preleg-proponojn akceptas d-ro Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, Germanio; ☎+49/30/541-26-33; ✉ 545-67-42.



• Japanio: Arĝentaj tradukantoj

Arĝenta Grupo estis fondita de sep geesperantistoj pli ol 57-jaraj en februaro pasintjare. En ses monatoj la grupanoj kunlabore japanigis tri librojn utilajn por komencantoj, kiel ekz. *Esprimo de sentoj en Esperanto* de Privat. La grupo planas traduki, presi kaj bindi po kvar tiajn librojn en ĉiu duonjaro. (T. Kobayashi)

Monografio de Andrew Large pri artefaritaj lingvoj, *The Artificial Language Movement* (1985), aperis en nova japana traduko de MIZUNO Yosiaki, profesoro de Universitato Meizi, tradukinto de biografioj de L. L. kaj Lidja Zamenhof. (*La Revuo Orienta*)



• Bosnio-Katalunio: Altnivela vizito

Kataluna E-Asocio organizis viziton (21-28 jan.) de Senad Čolić, prezidanto de E-Ligo de Bosnio-Hercegovino, al Katalunio. Čolić diskutis kun la estraro de KEA pri projekto por rekonstrui la movadajn strukturojn en Bosnio-Hercegovino kaj serĉis subtenon ĉe oficialaj instancoj por enkadrigi la projekton en la ĝeneralan rekonstru-helpan programon de Katalunio en Bosnio. Tiucele li renkontiĝis kun Ferran Llobet, el la kataluna konsilio (ministerio) por socialaj aferoj; Teresa Sandoval, Barcelona skabeno por interurba kunlaboro kaj junularo; kaj kun Antoni Farres, urbestro de Sabadell. Čolić estis akceptita ankaŭ de Felix Marti, direktoro de la Kataluna Unesko-Centro; de Aureli Argemi, sekretario de Internacia Centro por Etnaj kaj Naciaj Minoritatoj (CIEMEN); kaj de Josep Baltierrez, gvidanto de la movado "Katalunio por Bosnio". Por ĉi tiu kaj por la urbestroj de Barcelono kaj Sabadell Čolić alportis personajn leterojn de la Sarajeva urbestro, d-ro Tarik Kuposović.

Čolić prelegis Esperante pri la temo "Bosnio post Dayton" en la Centra kaj Aŭtonoma Universitatoj de Barcelono, en Mataró kaj Sabadell. KEA prizorgis ankaŭ E-programon por la gasto, i.a. renkontiĝojn kun katalunaj partoprenintoj de la Sarajeva IJK (1973). La radio kaj gazetaro larĝe raportis pri la vizito. Sur la foto, de maldekstre: Llibert Puig, ĝenerala sekretario de Kataluna E-Asocio; Senad Čolić; Felip Artero, kiu civilservis helpante bosniajn rifuĝintojn. (S. Čolić)

• Kroatio: "Bude Borjan" ĉie

Zorge de Kroatio E-Ligo, Esperanto aperis en tri televidaj elsendoj dum januaro: en plurminuta raporto pri la makedona vespero (25 jan.) de la Zagreba E-societo Bude Borjan, kaj — ĉe la regiona studio Varaždin — en dufoje elsendita programo pri *Tena*, nova libro de Spomenka Štimatec. La lanĉo de *Tena* en Zagrebo (21 feb.) estis parto de la programoj de Unesko por "la jaro de dumviva edukado".

Kadre de sia projekto pri la damaĝita urbo Petrinja (nov., p. 197), "Bude Borjan" kunokazigis tie la unuan postmilitan ekspozicion, pri ĉinaj papertranĉaĵoj. Okaze de la ĉina Nova Jaro, malfermis ĝin la 14-an de februaro la ĉina ambasadoro. Samokaze prezentiĝis ĉioj el E-gazetoj pri la helpo por rekonstrui la domon de instruistino Marija Horžinek en Petrinja. (KEL)

Lastatempe du elstaraj e-istoj ekhavis straton je sia nomo: Slavko Ježić (1895-1969) en Zagrebo kaj Marinko Gjivoje (1919-1982) en sia naskiĝ-urbo Korčula. (N. Rašić, D. Grgat)



• Amikeco: Ĉikaga semajno

Richard M. Daley, urbestro de Ĉikago, proklamis la semajnon 18-24 februaro Internacia Semajno de Amikeco en Ĉikago, "honore al la 109-jariĝo de Esperanto". (R. Kent Jones)

• Arto: Desegnu humure

La franca urbo Jonzac (en la Bor-doza vinregiono) anoncis plurkategorian desegno-konkurson kun mon-premioj, malfermitan al ĉiuj aĝoj, pri la temo "Humuro kaj vito". Sendu konkursaĵojn ĝis la 31-a de marto al: Concours Humour et Vigne, Office Municipal de Tourisme, BP 43, FR-17502 Jonzac Cedex, Francio.

• Interlingvistiko: Traduki planlingvo

En la 5-a jarkunveno de la germana Societo por Interlingvistiko (24-26 nov., Glienicke) 35 partoprenantoj aŭdis 12 prelegojn pri problemoj de tradukado kaj interpretado en planlingvoj, ekz. pri la nuna stato de aŭtomata tradukado, pri Esperanto kiel 12-a kontraktlingvo por EU, kaj pri frazeologismoj kiel tradukproblemo. (*Magdeburga Folio*)

• Katolikismo: Papo retmesaĝis

Kiel konate, Johano Paŭlo la 2-a devis ĉesigi sian multlingvan Kristnaskan saluton tuj post la komenco pro subita malbonfarto. Tamen, la salutoj estis komputile dissenditaj. Interreto liveris la papajn vortojn ankaŭ en Esperanto: "Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novan jaron". (*KEC-Bulteno*)

• Vortaroj: Por la revizio de PIV

Ĉu la nomoj de urboj, regionoj, gentoj kaj similaj informoj, menciitaj en Plena Ilustrita Vortaro kaj rilatantaj al via kutima loĝloko, ŝajnas al vi ĝustaj? Por la okazanta revizio de PIV, sendu viajn rimarkojn, argumentojn kaj proponojn al: Michel Duc Gonnaz, Val Saint-Georges, Chemin de l'Echelle, FR-13100 Aix-en-Provence, Francio. (SAT)

Arne E. ANDERSSON (1926-1995), delegito en Alingsås (Svedio) ekde 1939, vizitinto de pli ol 30 Universalaj Kongresoj, forpasis la 20-an de septembro.

Szilárd BÁLINT (1909-1995), e-isto ekde 1924, redakciano de *Hungara Fervoja Mondo* kaj de *Hungara Vivo* (1965-1990), aŭtoro de noveloj, instruinto, LKK-kunlaborinto de ambaŭ Budapeŝtaj UK-oj kaj de fervojistaj kongresoj, mortis la 3-an de novembro.

Pauline BARITEAUD (1910-1995), delegitino en Grasse (Francio) dum 35 jaroj, mortis la 28-an de novembro.

Hans BICKEL (1905-1995), 35 jarojn delegito en Horgen (Svislando) kaj fakdelegito pri kontraŭ-alkoholismo, mortis en decembro.

Mario FURLAN (1906-1995), mecenato de la movado en Triesto kaj de la granda vortaro itala-Esperanta, mortis la 9-an de septembro.

Roland JOSSINET, esperantisto ekde 1920, UEA-membro seninterrompe de 1937, iama delegito pri reviziado de manuskriptoj, forpasis antaŭ nelonge en Parizo.

Bo LARSEN (1931-1995), dumviva membro, forpasis la 9-an de decembro en Danio. Antaŭa estrarano de Dana E-Asocio, li estis forta subtenanto de la laboro kaj idealoj de Ivo Lapenna.

Herbert MÄRZ (1929-1995) mortis la 30-an de oktobro en Vieno. E-isto ekde 1947, li oficis en Internacia E-Muzeo de Vieno de 1966 ĝis 1990. Li verkis *Biblioteka Manlibro* (1979) kaj la libreton *Esperanto in der Praxis*. En 1967 li kunfondis Aŭstrian E-Movadon.

Elizabeta PALLÓS (1927-1995), delegito en Pécs (Hungario) de 28 jaroj kaj fakdelegito pri turismo, prezidiano de Hungara E-Asocio de 1968 ĝis 1986, LKK-sekretario de la 68-a UK en Budapeŝto (1983), mortis la 11-an de decembro. Ŝi organizis la popularajn naturamikajn renkontojn en Abaliget ekde 1967 kaj estis estrarano de Monda Turismo de 1974.

Sándor PÉTER (1942-1995), grupestro en Budapeŝto dum 20 jaroj, instruinto, dungito de Hungara E-Asocio en 1988-90, mortis dum la somero. Li multe helpis en 1987 la afrikajn aktivulojn kiujn UEA venigis al Eŭropo por la Varsovia UK.

Raymond PONS (1906-1995), fondinto kaj prezidinto de E-studrondo en la departemento Ariège (Francio), delegito dum kvarona jarcento, kursestro, forpasis la 27-an de oktobro.

Jaromír ŘEBÍČEK (1908-1995), esperantisto ekde 1920, kunkompilinto de fervojista E-vortaro, honora membro de Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj kaj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, UEA-membro dum 50 jaroj kaj delegito de 1964, mortis la 29-an de aŭgusto en Havlíčkův Brod (Ĉeĥio).

Donna SLUSHER (1924-1995), dumviva membro, delegito pri mineralogio dum 25 jaroj, mortis la 18-an de novembro en Aurora (Oregonio, Usono). Ŝi estris la loĝigan servon de la Portlanda UK (1972).

Corrado TAVANTI (1919-1995) mortis la 13-an de decembro en Le Locle (Svislando). Li lernis Esperanton kiel emerito, kaj — aŭtorinte sukcesajn radiodramojn en la franca kaj itala — ekverkis en ĝi pro instigo de Henri Vatré. Lia krimromano *Varmas en Romo* gajnis la premion Argus de LF-Koop (1982), aperis en 1986 kaj vendiĝis centmiloje en hungara traduko (1988). En 1990 sekvis ĝin *Tiu toskana septembro* (kun István Ertl). Lia romano *Tiu damna atenco ĉe la "Tri Fazanoj"* restas manuskripta.



Corrado Tavanti

Anoncetoj



Emerita doktoro, 76-jara, sana, bonaspekta, proponas, senpage, loĝadon kaj manĝadon en komforta domo, en centra kvartalo de Madrido (Hispanio), al Esperanto-parolanta dommastrino. Ŝi estu nepre pensiulino, sana, bonaspekta kaj preparata por dumviva kunvivado kaj reciproka akompanado por eviti la solecon. Proponas ankaŭ marbordan vilaon en mediteranea urbo, kun floroj, oranĝarboj kaj pinoj por vintrumi/somerumi. D-ro Arranz, Goya 89, ES-28001 Madrido (Hispanio); ☎ (91) 431 27 27.

31-jara masaĝisto helpema kaj zorgema, ŝatanta literaturon, muzikon, historion, turismon, religion, ŝatus fondi Esperantlingvan familion. D-ro

Wang Huai Yu, a/k 152, UA-327001 Nikolaev, Ukrainio.

Brokantaĵoj: petu ampleksan katalogon: Iltis-Eldonejo, Pf. 600130, DE-66067 Saarbrücken, Germanio. ☎/✉ +49 681 816713.

Internaciaj E-geedzparoj! Ĉu vi volus helpi min por mia aŭtuna prelegserio: "Esperanto, la lingvo de amo"? En mallonga letero vi povus rakonti kiel vi interkonatiĝis kaj kie, kiel la lingvo nun funkcias en via familio kaj kiel eblaj infanoj ĝin akceptis ktp. Por ebla radioprogramo mi petas ankaŭ vian telefonnumeron. Koran antaŭdankon. S-ro Harri J. Melasniemi, Mikonkatu 4 C 67, FI-20100 Turku, Finnlando.

István Bácskai (1908-1996)



István Bácskai, Honora Membro de UEA ekde 1988, forpasis la 23-an de januaro en Budapeŝto.


Post jura doktoriĝo en 1932, Bácskai laboris ĝis la emeritiĝo (1969) ĉe la Hungaraj Ŝtatfervojoj, kaj profesoris ĉe ties supera plukleriga instituto, kie li instruis ankaŭ Esperanton.

Li konatiĝis kun Esperanto en siaj studentaj jaroj kaj ekaktivis en 1945. Komitatano de Hungarlanda E-Societo en 1949-50, li partoprenis la reorganizan laboron de Hungarlanda E-Konsilantaro (ekde 1955) kaj de Hungara E-Asocio, fondita en 1960. Li estis vicprezidanto (1960-1973), prezidanto kaj komitatano (1960-1986) de HEA, kiun li reprezentis en la komitato de UEA dum 1965-1967. En 1981 li fariĝis honora membro, en 1986 honora prezidanto de HEA. Li grave rolis en la eldonado de la revuoj *Hungara Esperantisto* (1961-1973) kaj *Hungara Vivo* (1961-1990); li estis redakciano de *Hungara Vivo* inter 1969 kaj 1974.

D-ro Bácskai fondis en 1957 la Fervojistan Fakon de la landa E-asocio, kaj ĝi sub lia prezido (1957-1986) iĝis unu el la plej aktivaj landaj sekcioj de Internacia Fervojista E-Federacio (IFEJ). Li estis la fondanto, respondeca

redaktoro (ĝis 1984) kaj respondeca eldonanto (ĝis 1995) de la altnivela faka revuo *Hungara Fervojista Mondo* (1957-), en kiu li ofte artikolis. Li iniciatis kaj realigis ke aperu E-lingvaj informoj en la horarlibroj de la Hungaraj Ŝtatfervojoj — praktiko kiu daŭras seninterrompe ekde 1961 ĝis nun. Organizanto kaj gvidanto de la hungara fervojfaka Terminara Komisiono, li redaktis kaj eldonis la dudirektan hungaran-Esperantan *Fervoja terminareto* (1968). Inter 1968 kaj 1975 Bácskai reprezentis IFEJ en la Komitato de UEA. Li estis honora membro de IFEJ ekde 1976, honora prezidanto de Hungara Fervojista E-Asocio de 1986, UEA-delegito pri fervojoj ekde 1965. Kiel LKK-prezidanto li motoris la organizadon de la 14-a IFEJ-Kongreso (Budapeŝto, 1962), la plej granda en la historio de IFEJ, kaj kunlaboris en la 34-a (Balatunfűrdő, 1982) kaj 47-a (Pécs, 1995) IFEJ-kongresoj — same kiel por ambaŭ Universalaj Kongresoj okazintaj en Budapeŝto (1966, 1983).

Albert Goodheir (1912-1995)



Albert Goodheir, poeto, tradukisto, redaktoro, mortis en Glasgovo la 27-an de decembro 1995.

Goodheir naskiĝis la 26-an de junio 1912 en Utreĥt (Nederlando). Laŭ liaj propraj vortoj, lia vivo “estis iom nekonvenca kaj ne mankis en ĝi vari-eco.” Li estis “interalie instruisto de historio kaj lingvoj, pastro de la Skota Eklezio, farmlaboristo en Skotlando

kaj Kostariko, fiŝlaboristo sur la Ŝetlandoj kaj helpflegisto en mensmal-sanejo”. Li doktoriĝis en Utreĥt en 1938, poste studis teologion en Glasgovo kaj filozofion en Londono. Dum multaj jaroj li servis kiel pastro en la gaela parto de Skotlando; poste li fariĝis kvakero.

Esperantisto ekde 1967, li verkis siajn unuajn poemojn en 1970. Li estis baldaŭ kronita de laŭroj, i.a. en la Belartaj Konkursoj de UEA, kaj fariĝis “aŭtoro de la jaro 1975” ĉe La Patrolo. Sekvis tamen nur tri poemaroj: *Merlo sur menhiro* (1974, 1979), *Enlumigo* (1987) kaj *Nordmara duopo* (elektitaj poemoj, kun Rejna de Jong, 1994), sed kun dense riĉa enhavo.

Li verkis monografeton pri la filozofio de Spinozo, *Fondita sur roko* (1977), kaj plurajn broŝurojn pri kulturaj, religiaj kaj lingvaj temoj. Li tradukis fekunde kaj bone, el la helen-: aperis *Bakĥantinoj* de Eŭripido (1975), *Apologio de Sokrato* kaj *Kritono* de Platono (1981), *Prometeo ligita* de Eŝilo (1982), *Trojaninoj* kaj *Ifigenia en Taŭrido* de Eŭripido (1985);

el la latina: *Konsolo de la filozofio* de Boethius (1984); el la angla: la romanoj *Forkaptita* (1976) kaj *D-ro Jekyll kaj s-ro Hyde* (1980) de Stevenson, *Baladoj el Asante* (1981) el Ganao, la dramo *La petolulo de la okcidenta mondo* de John M. Synge (1989); el la irlanda gaela: la satira poemo *La noktmeza kortumo* de Brian Merriman (1980). Li redaktis la duan parton (1800-1960) de *Angla antologio* (1987). Plejparto de liaj verkoj kaj tradukoj aperis sub lia propra marko Kardo, kiu eldonis pli ol 30 librojn kaj broŝurojn.

En la movado li aktivis multflanke: kiel instruanto por senpaga koresponda kurso en Britio, preleganto rondvojaĝa (1978) kaj kongresa (UK, 1980), unu el la animantoj de Filozofia Asocio Tutmonda, sekretario de la E-societo en Glasgovo, delegito en Glasgovo ekde 1974 kaj poste fakdelegito pri literaturo, redaktoro de *Esperanto en Skotlando* ekde 1975, kaj kiel membro (1979-89) kaj sekretario (1979-82) de la Akademio.

En sia poemo *Rekviemo*, dediĉita al la edzino Filisa, Albert Goodheir mesaĝas ankaŭ al ni: “Iam mi vin lasos kiam haltos la kor’, / ĝojo ne forpasos kiam mi estos for.”

Retoriko rabatite ĝis junio!

Kvankam Ivo Lapenna mortis antaŭ pli ol 8 jaroj, pluraj liaj verkoj daŭre aktualas kaj prezentas gravan kulturen heredaĵon de nia lingvo. Ili estas aparte rekomendindaj al la novaj movadaj generacioj. Jen la sortimento:

Retoriko (3-a eld., 1971). 294p. Tole bindita. Antaŭparoloj de R. Rossetti kaj G. Waringhien. Ĉefverko de la plej bona oratoro en la historio de Esperanto, kaj ĉefverko de la faka E-literaturo, ĉiam aktuala gvidlibro por majstri la arton de la publika parolo. Prezo: 51,00 (ĝis la fino de junio 48,00) gld.*

Hamburgo en retrospektivo (2-a eld., 1977). 162p. Pri la historiaj ŝanĝoj en UEA dum la Kongreso en Hamburgo. Prezo: 33,00 gld.

Kritikaj studoj defende de Esperanto (1987). 60p (grandformata). Eseo el la jaroj 1952-1984, en kiuj la plej brila advokato de Esperanto montras kiel defendi la lingvon. Prezo: 22,80 gld.

Elektitaj paroladoj kaj prelegoj (1966). 152p. Inspiraj oratorajoj pri la evoluo de la E-movado en la 50-aj kaj 60-aj jaroj. Prezo: 33,00 gld.*

Memorlibro pri la Internacia Jubilea E-Konferenco, Graz 1987. Cent jaroj de Esperanto-kulturo (red. K. Perko, 1989). 168p. Inter valoraj referaĵoj (i.a. de Albault, Régulo Pérez, Boulton, Ragnarsson, Neergaard kaj Thierry) troviĝas ankaŭ la lastaj paroladoj de Lapenna kaj pluraj fotoj. Prezo: 50,70 gld.

Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo (1952). 144p. Pri la konstruado de la postmilita internacia ordo. Prezo: 33,00 (ĝis la fino de junio 27,00) gld.

*Por tiuj du libroj UEA donas trionan rabaton je aĉeto de minimume 3 ekz. (por ĉiuj aliaj validas la kutima sesona rabato je aĉeto de 3 ekz.). Kiel kutime, aldoniĝas la sendokostoj kaj la imposto (nur por la loĝantoj de EU-landoj). Mendu ĉe la Libroservo de UEA!

Ankaŭ vi povas kontribui!

Fondaĵo Ameriko



helpas al la Esperanto-movado en Centra kaj Suda Ameriko. Vian donacon vi povas sendi pere de la kotizperanto en via lando aŭ rekte al UEA. Dankon!


LETERVESPERO

Por grava ekspozicio en majo 1996, oni petas poŝtkartajn salutojn el la tuta mondo. Nepraj respondoj. Esperanto-klubo de Venado Tuerto, C. Correo 407, 2600 Venado Tuerto, Argentino.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KOTIZAKTO estas gazeto por ĉiu, kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KOTIZAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1996 **KOTIZAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1996

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2300 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	16 pundoj	Italio	34000 liroj	Svedio	185 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

Antaŭ kelkaj jaroj aperis

HUNGARA KURSLIBRO

la plej ampleksa lernilo de nacia lingvo en Esperanto.
En 1995 aperis unika

PAROLTURNARO

ĉefverko de H. & K. Wiersch: pli ol 20.000 parolturnoj en la germana kaj Esperanto, laŭ la germanaj ĉefvortoj.

Mendu ĉe la eldonejo Esperanto 2000 (Duisburgsestraat 12, BE-3001 Leuven, Belgio), ĉe FEL, ĉe UEA aŭ ĉe via landa libroservo.

Parolturnaro germana-Esperanto: 414 p, 20 cm, 42 gld aŭ 39 DM (+ sendokostoj).

Hungara kurslibro: 384 p, 20 cm, 39 gld (prezo ĉe la eldonejo, + sendokostoj)

LIBRO DE AMO

*"Leganto, se vi estas pruda
Kaj naŭzas vin la amo nuda ..."*

... tiam nepre ne aĉetu ĉi tiun faman majstroverkon de la Esperanta erotika poezio, kiu malkovris al tiom da geesperantistoj la misteron kaj belon de sekso.

Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. Byblos: Je la ŝildanonco de "L'Akacio", 1969. 262p. 20cm. Enhavas la senpudoran *Sekretaj sonetoj* (1931) k.a. Prezo: 21,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

La Kosmologio de Martinus

Esperanto-semaĵo

11a - 17a de aŭgusto 1996 en Danio

La kosmologio montras ke ekzistas psikaj naturleĝoj pri pensado. Scio pri tio ebligas al la homo ekregi sian menson kaj future krei mondregnon surbaze de kosma logiko kaj humanismo. Petu senkostajn broŝurojn kaj provekzempleron de la revuo KOSMOS ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 96, DK-2000 Kopenhago F, Danio.

☎ +45 3834 6280 - Fakso +45 3834 6180

Nenia unuiĝo aŭ membreco



**SOMERMEZAJ
ESPERANTO-
STUDSEMAJNOJ** *AAA*
EN FINNLANDO
1996!

**En Tampere (Virrat) 24.-28.6.1996 kaj en Jyväskylä
1.-5.7.1996. En ambaŭ studsemaĵoj instruos konata
Esperanto-pedagogo, Stefan MacGill el Hungario.**

La 3a Esperanto-semaĵo de Tampere.

La kursloko estas la moderna Internacia Junulara Kurscentro de Marttinen en Virrat, ĉ. 100 km norde de Tampere. Okazos dunielaj Esperanto-kursoj, instruos ankaŭ Pentti Järvinen (Finnlando).

Samtempe okas kaligrafio-kurso per Esperanto; la instruisto estos Gennadi Leontjev (Finnlando/Estonio).

Ni ankaŭ havos eblon ekzerci padeli en rapidfluo kaj konatiĝi kun finnaj tradiciaj loĝejoj en muzeovilaĝo ĉe la kursejo.

Pliaj informoj kaj aliĝadreso: Esperantosocieto Antaŭen, Teivaalantie 85, FI-33400, Tampere, Finnlando. Tel. +358 31 3463 493.

Verda Aventuro – tradicia somera studsemaĵo en Jyväskylä, jam la 28a.

La ĉi-jara temo estas naturo, kaj ni garantias kompetentan instruadon, variajn tagajn temojn kun ekskursoj kaj multflankan vesperan programon.

Bonvenon al novaj kaj malnovaj geamikoj por pasigi unu someran semajnon en la lagoriĉa Mezfinnlando.

Petu pliajn informojn: Esperantoklubo de Jyväskylä, s-ino Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, FIN-40630 Jyväskylä. Tel. +358 41 254 609.

**Fondaĵo
Canuto**

*Multaj arde deziras membriĝi
en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via
donaco al Fondaĵo Canuto helpos
nin teni la kontaktojn kun tiuj,
kiuj suferas pro transpagaj baroj.
Antaŭdankon pro via solidareco!*

Alphonse Daudet:

**Tre mirigaj aventuroj de
TARTARIN DE TARASKONO**

*La Libroservo de UEA ankoraŭ havas
kvanton de tiu ĉi humura majstroverko!*

192 p., tole bind., ilustr. 18 gld., triona rabato ekde 3 ekz.



**Pasintjare 270 esperantistoj subtenis
la agadon de UEA per aliĝo al**

Societo Zamenhof

En unu jaro tiu nombro preskaŭ duobliĝis. Aliĝu ankaŭ vi al la plej rapide kreskanta klubo de la Movado! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj donaceton kun la Jarlibro. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.



Jaan Ojalo:

esperantaj sinonimoj



La plej kompleta de sia speco; bazita sur Plena Ilustrita Vortaro. La unua parto donas sinonimojn por ĉ. 2000 vortoj. La dua parto estas indekso, kiu ebligas trovi sinonimojn por 5500 vortoj. Tre utila por pliriĉigi la vortotrezoron kaj freŝigi la stilon.

Dua korektita eldono, 1993. 96p. Prezo: 15 guldenoj. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

UEA reeldonis la bazan gvidilon por instruantoj de la internacia lingvo:

**metodiko
de la esperanto-
instruado**

de Rudolf Rakuša (1893-1970)
Temas pri 3-a eldono de la verko
unue aperinta en 1957 kaj
kompletigita en 1970. 189p.
20cm. ISBN 92 9017 045 X.

Prezo: 15,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.
Havebla de la Libroservo de UEA.



**Language Problems
& Language Planning**

Journal of the Center for Research and
Documentation of World Language Problems

**La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.**

Redaktas: Klaus Schubert,
Probal Dašgupto, Humphrey Tonkin.

Eldonas: John Benjamins B.V.,
P.O. Box 75577, NL-1070 AN Amsterdam.

Aperas trifoje jare.

Individua abono: 72,00 gld.

Institucia abono: 157,00 gld.

Abonu pere de la Libroservo de UEA.